



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Aŭgusto 2020 n-ro: 56



Merhaba,

Yaz geldi, dışarıda korona virüsü tüm hızı ile yayılmaya devam ediyor, ancak insanlar umursamazcasına tatil yerlerinde orada burada birbirleri ile iç içe dikkatsizce bulunmaya devam ediyorlar. Kış gelecek ve belki de pandemi tekrar tüm dünyada, şimdilik zor durumu atlattığımız görünen ülkelerde bile, tekrar yükselişe geçecek.

Bu ortamda sizlere dergimizin Ağustos sayısını evde kalıp okumanız için gönderdik. Lütfen kalabalık ortamlardan uzak durun. Maskenizi takmaya devam edin. Unutmayın ki maske sosyal mesafeyi korumakla birlikte korona virüsüne karşı kendimizi kormak için şimdilik elimizde olan tek etkin önlemdir.

Hepinize iyi okumalar !


Saluton,

Venis somero sed ekstere la kronviruso disvastiĝas senbride, tamen homoj senzorge pri tio, en feriolokoj, tie kaj ĉi tie daŭre troviĝas unu apud la alia senatenteme. Venos vintro kaj eble la pandemio denove en la tuta mondo, eĉ en tiuj landoj, kiuj aspektas postvivi la malfacilan situacion de la viruso, denove leviĝos.

En ĉi tiu kunteksto ni sendis al vi la aŭgustan numeron de nia revuo por resti hejme kaj legi ĝin. Bovolu resti for de popolamasaj lokoj. Daŭrigu la surmetadon de via masko. Ne forgesu, ke la masko kune kun la zorgo pri la socia distanco por nun estas la nura efika mezuro por protekti nin kontraŭ la kronviruso.

Bonan legadon al ĉiuj !

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:


Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Ciklo kun Hori Jasuo	2
Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Tempo Sigelita	5
EOSA (AŬRORA) – ORIONO (ΩΣ – ΩΡΙΩΝ)	6
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	9
Mi kapo doloras	10
La dometo de feliĉo	10
Anseroj	11
Amuza Matematiko	11
El la literaturaj paĝoj de MAS	12
La naŭ instruistinoj el Parnaso (3)	14
La Kimero-Rakonto el la estonteco (3)	16
Astrologio kontraŭ Psikologio - Julio/Kankroj	16
Internacia Literatura Esperanta Konkurso	17
El la libro de "Dao de Jing" (47)	18
Grete Berger-Falk (1968)	19
Ŝercoj	20
Kurcvortenigmo	20
La Maltaj megalitaj pratemploj	21
Leciono de ĉiutaga vivo	21
Poeziaĵoj de Ilir Zhiti	22
La Trojanoj (Τρώες)	22
La legendo de Rozafa	23
La beleco stas tragika	23
Tuta somero dum unu tago	26
Miaj unuaj jaroj de Esperantisteco	28
ALESPERANTO	31
Facilaj rakontoj	32

Kursoj



En la 22-a de februaro okazis kunveno por konatigi Esperanton al nesperantistoj. Pro la kronviruso kaj kvaranteno estas neniu ebleco aktivi pri Esperanto lingvo.

Ciklo kun Hori Jasuo -- poemoj de Elena

La leontodoj
flavas inter la herboj,
kiel sunetoj.
Ŝatataj de l' abeloj,
kuracil' por la homoj.



De kiam la karpoj
"flugas"? Ĉu pri donacoj
Naivaj karpoj! ...
Nun oni ĉion pagas,
ofte per sia vivo...



Bambuo – arbo
pli forta ol la fero.
Verda gardisto.
Portas ĝi harmonion
kaj pacon en ĉiu dom'.



La Natur' ploras
kaj sendas al ni punon –
virus' murdisto.
Ne sufiĉas la ĉerkoj...
Nur Dio povas helpi.



verkis kaj sendis **Elena Popova** el
Bulgario
bildoj de **Hori Jasuo** el Japanio



Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



Ĉijare en julio okaziis la 64-a Sumoo, kvankam antaŭe estis anoncita, ke en julia Sumoo ne okazos. Pro la

kronviruso ĉiuj Esperanto-eventoj estas nuligitaj. En tiu situacio ni decidis, ke nia Sumoo povos okazi por la bono de la Esperanto-movado.

La 64-a Sumoo okazis ekde la 12-a de julio ĝis la 26-a de julio. Sed la analizoj de la Sumoo ankoraŭ ne estis pretaj dum nia redaktado de la aŭgusta numero de Turka Stelo revuo. Ni ilin publikigos en la venonta numero.

Nia retejo:

<http://www.esperantosumoo.pl/>


Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_EsperantoSumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/>

UEA



N-ro 895 (2020-07-23)
Montreale, virtuale: Kanado en la Virtuala Kongreso de Esperanto (VK)

kaj MondaFest' 2020

Eĉ se la montreala UK de 2020 devis esti prokrastita al 2022, la Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), okazonta de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto – precize en [...]

N-ro 894 (2020-07-16)

Programo de la Virtuala Kongreso de Esperanto: unua rigardo

Kadre de la Monda Festivalo de Esperanto, la Virtuala Kongreso (VK), de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto, proponos buntan programon, kies unua gustumo troviĝas ĉi-komunike kaj superrigarde ĉe [...]

N-ro 893 (2020-07-14)

Alvoko por la Oratora Konkurso kadre de la Virtuala Kongreso - MondaFest' 2020

Kiel parto de la Virtuala Kongreso okazanta en la kadro de la Monda Festivalo de Esperanto 2020 [...]

N-ro 892 (2020-07-13)

Alvoko al Kunmanĝado tra la Mondo, la 5-an de aŭgusto, merkredon, 16:00-18:00 UTC

Unu el la tradiciaj eroj de la Universalaj Kongresoj estas la bankedo. Estas facile konstati, ke kunmanĝado estas unu el [...]

N-ro 891 (2020-07-04)

MondaFest' 2020: Sonlibro "Vi estas mia heroo" lanĉita kaj venontaj eventoj

La Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020) komenciĝis promesplena en junio (uea.org/gk/889). La julian programon ankaŭ inaŭguris tre specialaj [...]

TEJO



Momentoj de IJK 2020 en la reto

Jen kio okazis dum la unua reta

IJK 2020! La sukceso de la 76-a Internacia Junulara Kongreso estas pro ĉiuj organizantoj, kontribuantoj kaj partoprenantoj, kiuj kune kreis unikan etoson. Dankon al ĉiuj! [...]

Estraro de TEJO 2020-2021

Ni ĝojas prezenti al vi la novelektitan estraron de TEJO por la mandato 2020-2021.

Prezidanto: Charlotte Scherping

Larsson Vicprezidanto: Carlos

Pesquera Alonso Vicprezidanto:

Tomáš Stano Ĝenerala Sekretario:

Konstanze Schönfeld (Tuŝka)

Kasisto: Mung Bui (Feliĉa)

Estrarano: Karina Oliveira

Estrarano: Klára Ertl Estrarano:

Rogier Huurman (Roĉjo)

Estrarano: Robert Nielsen [...]

Komitatanoj Ĉ 2020-2022

Jen la ĵuselektitaj Komitatanoj Ĉ por la mandato 2020-2022!

Gratulojn kaj bonan laboron! 1.

Rakoen Maertens 2. Querino Neto

3. Hans "Hanso" Becklin 4. 신현규

(Shin Hyunkyū – Mondero) 5. 文

琪 (Zhao Wenqi – Venki) 6.

Mireille Mahugnon Houkpé 7.

Charlotte Scherping-Larsson 8.

Konstanze "Tuŝka" Schönfeld

[...]



Leteroj de niaj legantoj



Danko por la julia Turka Stelo kun mia poemeto en ĝi.

Havu belan tagon, monaton!

Lenke Szász el Rumanio



Estimata,

Koran dankon por via zorgado al Turka Stelo!

Mi ĝojas vidi la interesan artikolon skribita de s-ro Konuralp Sunal Buyukada en la Vol. 55(2020) de la gazeto.

Lia "KREPUSKA SAMURAJO" instruis multajn fakojn eĉ al mi, japanoj.

Nova eltrovo estas en tio. Mi supozas, ke li studas multe la japanan historion.

Tuj mi luis de librejo la libron "Tasogare Seibei". Sed bedaŭrinde, la enhavo estis pli simpla ol la skribaĵo.

La fama reĝisoro Yōji Yamada kune kun Yoshitaka Asama eble dramigis la novelon de Shūhei Fujisawa, kiun ankaŭ mi tre ŝatas.

Nia esperanta grupo planas legi lia esperantan verkon sekvanta sabate. Bovolus konatiĝi tion al s-ro Buyukada. Dankon!

Kacu MATOBA, Takarazuka, Hyogo Japanio.



Kelkaj komentoj pri la julia numero de Turka Stelo:

1) Pri Victor Sadler mi ĉiam memoras tiun delican poemon, kiun mi konas parkere

Mi (Kiam en la kuniklejo)

Mi

(kiam en la kuniklejo de via sako

vi furioze fosas pro bileto, kiu

tre verŝajne jam eskapis)

amas vin.

(Kien, cetere, vi metis

mian koron?)

Victor Sadler

2) La poemo de Charles Bezzina estas raviga, mi ŝatas.

3) Mi tre konsentas kun la artikolo de Anna Lowenstein pri la uzo de neologismoj laŭdire "poeziaj". Fakte la poeziaj vortoj estas tiel, ĉar al la legantoj ili portas aludojn, elvokojn, konnotaciojn. Sed se oni enkondukas neologismojn en esperanto, tiuj portos kun si al la leganto nenion, neniom da elvokoj, ĉar li tutsimple ne konas ĝin ! Kiel estus do en Esperanto la ekvivalento de poeziaj vortoj ? Sed tutsimple

fundamentecaj kombinaĵoj/kreaĵoj el fundamentaj radikoj, kiel "la mastro as fore" alportas kun si ILI elvokojn, konnotaciojn, parolas al la leganto ILI ! ne la nelogismoj.

4) De Kalocsay mi aparte ŝatas la sonetojn, kiujn li verkis dum la Dua Mondmilito, la unua en la aŭtuno 39, la dua fine de la milito :

Aŭtuna parko

Neniam tiel belis la aŭtuno.

Paradas pompe en la park' la arboj

Per milnuanca bunto de la farboj,

Oranĝkoloro, flavo, ruĝo, bruno

Fajreras en la milda bril' de l'suno,

Kaj sub karesa flato de lumgarboj

La branĉoj zumas kiel aerharpoj

Laŭ melodio de mistera runo.

Mi dronas en ĉi granda idilio,

Surfalas min folioj de tilio,

Kaj la natur' senhoma min enlulas.

Sed min defore trafas nun murmure

Obtuza bru'. La mondo tie brulas,

La historio marŝas al ni dure.

Kalman KALOCSAY

aŭtuno 1939

en «Tra la ŝtormo»

1939-1945

Perspektivoj

Pasis la febro, ŝajne min evitas

La bomboj, nun do la alternativo

Tria prezentas sin al mi : la vivo.

Sed ĝi min pli repuŝas ol invitas,

Dum tiuj hororbildoj min ekscitas:

La judoj, kiuj de l'Danub-deklivo,

Post la nukpafo, por trankvila drivo,

Sendoloriĝe en la ondojn glitas.

Centjar' dudeka ! pri vi ni fieris

Epok-ŝovine ! En vi ne fajreras

Autodafeoj, ŝorĉistin-ŝtuparoj.

Jen mi nun sidas, en epok' obskura,

Kaj min teruras: Kion kun la jaroj

Alportos eble la centjar' futura?

Kalman KALOCSAY

en «Tra la ŝtormo»

1939-1945

Roland Platteau el Francio

TEMPO SIGELITA

Proksime Gvatataj Trajnoj (1966)

Ostre Sledované Vlaky (ĉeĥa originala titolo)

Novelo: Bohumil Hrabal

Scenario – Direktoro: Jiří Menzel



“Li mortis antaŭ ol amori kun sia amatino”, “Li fariĝis viktimo de milito antaŭ ol povi pruvi sian virecon al sia amatino”, “En ĉi tiu monotona urbeto, iuj el la oficiroj, kiuj ŝajnis for de ĉi tiu politiko, estis fakte sekretaj herooj”, “Ordinara, sintenema, kvietadoleskanto neatendite faris heroecaĵon.”

Post kiam la filmo finiĝis, ĉi tiuj kaj similaj pensoj trairis mian kapon. Sekreta mokado kaj ironio en la filmo rememorigis min pri la filmo de Aki Kaurismaki, “Viro sen pasinteco”, pri kiu mi verkis dum la pasintaj monatoj.

La filmo komenciĝas per la enkonduko de nia heroo, Milos, pri si kaj sia familio, en la tago li komencas sian novan postenon. Mallaborema patro, kiu pensiĝis frue, sorĉisto avo, kiu provis haltigi la tankojn kun la potenco de hipnotismo kaj senluziĝis. Praavo, kiu dum li estis trumpetisto en la armeo, vundiĝis per ŝtona bato sur la kapo, retiriĝis, kaj nun provas ĝui la tagon per unu guldeno, unu botelo de rumo, kaj du pakaĵoj da tabako; mortigita de laboristoj, kiujn li kolerigis babilante dum la tagoj de lia pensiĝo... Nur ĉi tiu rakontado en la komenco de la filmo sufiĉas por speguligi la ironion de la filmo. La sorto de Milos realiĝas laŭ maniero, kiu “konvenas” al ĉi tiuj familianoj.

En ĉi tiu malrapida sed neĝena filmo, Milos, la maljuna stacidomo oficisto s-ro Novak, kaj la pli maljunaj virinoj estas senvigliaj roluloj, sed ĉiuj aliaj, la stacidomo oficisto Hubicka, la stacidomo estro, la telegrafo oficistino Zdenka, la amantino de Milos, Máša kaj ŝia fotisto onklo, inspektisto Zednicek, la Grafino ktp estas ĉiam vivaj kaj dinamikaj roluloj.

Sekseco, la atmosfero de milito en la fono, la

verkis kaj sendis Konuralp Sunal el Turkio

monotoneco de vivo aŭ la monotoneco de vivo en ĉi tiu urbeto estas montrata en plum-peza ritmo, delikate ridindiganta tragikajn okazaĵojn, eĉ okazaĵojn kiel sinmortigo, morto ktp. La flirtado de viroj kun virinoj, kaj la ĝeno pro tio de la maljuna generacio (ekzemple la reagoj de la patrino de la telegrafo oficistino kaj la reagoj de la stacidomo ĉefo) estas montrataj en ekvilibro de amuzaj kontrastoj. Unu el la kuriozaj aferoj estas, ke Milos klarigas sian problemon pri la antaŭtempa ejakulado al ĉiuj en sia ĉirkaŭaĵo kaj rakontas pri la konsilo de D-ro Brabeck, ke li devas seksumi kun matura virino por “resanigi” sin. Ĉi tiun mallongan rolon de kuracisto ludas la reĝisoro de la filmo Jiří Menzel. La flirtado de la juna telegrafo oficistino kun Hubicka, kiu stampas stampilon sur siajn kruojn kaj koksojn estas unu el la erotikaj, provokaj tamen same ĝojigaj bildoj de la filmo. La paŝo de Milos al plena vireco kun la iama cirko-artistino, matura virino, Viktoria, estas spegulita kun gusto sentroige. Mallonga dialogo antaŭ ol kaj “ne montrita” sceno de seksumado.



Ni devas koni la verkpovon de Bohumir Hrabal, la fonto de la skripto. Li verkis ĉi tiun romanon en la jaro 1965. La sekva jaro ĝi estis adaptita por kino; en nigra-blanka koloro.

Bohumil Hrabal estas inter la plej gravaj ĉeĥaj verkistoj de la 20-a jarcento, same al Hašek, Čapek kaj Kundera. La Brua Soleco (Přiliš hlučná samota) estas konsiderata kiel la aŭtobiografia ĉefverko de Bohumil Hrabal.

Hrabal naskiĝis en Brno la 28-an de marto en 1914 el eksteredzeca amrilato. Li vivis kun siaj geavoj ĝis la aĝo de tri. En 1916, lia patrino laboranta ĉe la bierfarejo edziĝis kun librotenisto samloke, kiu fariĝis duonpatro de Hrabal. Kiam li havis dek jarojn, lia onklo Pepin ekloĝis en ilia hejmo. En sia infanaĝo, li estis influita de la ŝercoj kaj memoroj de sia onklo, kiu estis klera kaj sperta rakontisto. Li komencis studi juron ĉe la Karl-Universitato de Prago en 1934. Kiam la milito >>30

Logas min precipe historioj kies kerno estas la amo, la amoro kaj ties sekvoj, amdeziroj, pasioj, plezuroj, sensamo, volupto, ĉio! Allogas min tiaj historioj, ĉu ordinaraj, ĉu komplikaj, ĉu troaj, ĉar ili estas belaj, belaj kiel la homa vivo mem, kiu ĉerpas sian veran intereson precipe el la ekscitiĝo de sentoj, de sensoj, el la anima kaj korpa impulso.

milito, de Areso (Άρης), kiu ne interesiĝis multe pri ordinaraj amhistorioj. Tio, eble, okazis, ĉar la maldelikata dio estis la konstanta amoranto de la plej bela, de la unika majstrino de la amorarto, Afrodita (Αφροδίτη), la diino de la amo kaj belo.



Aurora - Αυγή (1614)

Ŝajnas, ke la antikvaj helenaj dioj havis la saman opinion, pro tio ili kreis aŭ enmiksiĝis en multajn tiajn, plaĉajn, homajn kaj diajn, amhistoriojn, el kiuj mi ĉerpas ankoraŭ unu:

La lumo! Jen la plej kara, la plej valora dia donaco, la bonaĵo kreanta ĉion sur la tero. Povas esti lumo brila, hela, plurkolora, pala, nehela, ĉiam ĝi estas necesa, vivodona, bela!

Tiun unikan bonaĵon regas tri splendaj gefratoj. Estas la brila dio Helio / Suno (Ήλιος) kaj liaj du fratinoj, Eosa / Aŭrora (Ηώς), kaj Selena / Luno (Σελήνη). Kiom tiuj tri diaj fortoj plenumas sian taskon, tiom la vivo en la mondo daŭros. Oni povas multon diri pri la brilaj gefratoj, tamen ĉi tie nin interesas la pli juna fratino, Eosa.

Eosa aperas la unua. Ŝi estas tiu, kiu, per siaj delikataj rozaj fingroj, lante levas la vualon de la nokto kaj, kronita per freŝaj floretoj, en sia plena, nepriskribebla beleco, eniras en la mondon, alportante la unuan hezitan lumon. Ŝi surhavas blankajn kaj orajn araneteksitajn robojn kaj dum sia pasado ŝi disĵetas sur la florojn, sur ĉiujn kreskaĵojn sian roson, kiu, iom pli poste, lumata de la unuaj radioj de la majesta Helio, brilas kiel diamantoj, kiel steletoj falintaj sur la freŝa tero. Eosa lante venas kaj ŝia fratino, Selena, la reganto de la nokta, luna lumo, same lante deiras. Post Eosa venas, per sia grandioza kvarĉevala ĉaro, la ĉiam ridanta, gaja, ĝojoplena dio, Helio, la alportanto de la plena lumo.

Kompreneble, Eosa estis treege bela, tiom, ke iam ŝi vekis la ampasion, eĉ de la kruda dio de la

neordinara okazo, la sovaĝa Areso ekdeziregis Eosan kiu volonte akceptis lin en sian liton. Tio okazis nur unu fojon, tamen sufiĉis por kaŭzi la ĵaluzon kaj la koleron de Afrodita. La ofendita amorantino de Areso ne povis fari malbonon al alia diino, sed ŝi povis ŝin malbeni, kaj ŝi bone sciis la manieron destini al siaj amrivalinoj, ke ili spertu grandajn damaĝojn kaj malfeliĉojn. Ŝi, do, malbenis Eosan, ke ŝi estu ĉiam enamiĝinta, ke ŝi deziru amorpartnerojn, kiujn tamen ŝi ne povos teni apud si longe. Post tio, ĉiuj amhistorioj de Eosa havis malbonan finon.

Esplorante la plej gravajn tiajn okazojn, mi diru, ke unue Eosa arde enamiĝis al Astreo (Αστραίος), la bela titano, kun kiu ŝi vivis kelkan tempon feliĉe, kaj de kiu ŝi naskis gravajn filojn, la ĉefajn ventojn kaj multajn stelojn. Tamen, Astreo neatendite mortis tre juna kaj tiam Eosa enamiĝis al Titono (Τιθωνός), belega sed mortema, ordinara juna viro, kiun ŝi kondukis al sia brila palaco, en la plej fora okcidento, ĉe la bordoj de Oceano (Ωκεανός). Eosa amis pasie, arde sian novan edzon kaj ĉar ŝi timis, ke ankaŭ tiu ĉi ŝia nova amanto povus morti, ŝi petegis la reĝon de la dioj, Zeŭson (Ζεύς), donaci al li la senmortecon. Ne estis facila afero, tamen, post ŝiaj persistaj petoj, Zeŭso, kiu verŝajne simpatiis la amoreman diinon, komplezis al ŝi per la petita donaco, do, Titono iĝis senmorta kaj Eosa estis longe feliĉa. Ŝi ĝuadis avide sian vivadon kun la belega kaj en ĉio bona sia edzo. Tamen, la jaroj pasis kaj iam Eosa rimarkis, ke ŝia edzo komencis maljuniĝi. Nur tiam ŝi konsciis, ke ŝi estis petinta de Zeŭso la senmortecon sed ne ankaŭ la eternan junecon de sia amanto. Estis granda kaj fatala ŝia eraro, estis nepardonebla malsaĝaĵo, bedaŭrinde ne plu korektebla. La hararo de Titono griziĝis, poste blankiĝis sed li ĉiam estis bela kaj aminda. Eosa faris ĉion eblan por konservi la bonan formon kaj farton de sia amata edzo, ŝi nutradis lin per ambrozio kaj mielo por ke li ne perdu la vivofreŝecon kaj sian viran povon. Ŝi sencese prizorgadis lin ameme, tamen la faltoj de Titono plimultiĝis, ili komencis sulki lian vizaĝon, lian

tutan korpon, post kelka tempo la bela viro tute velkis, sulkiĝis, ŝrumpis, li povis nek moviĝi nek senti ion ajn. Li estis senmorta, do, li devis resti eterne en tia ekstreme kompatinda stato, kaj Eosa, ploregante, petegis denove Zeŭson, ke li donu al ŝia amata edzo alian formon, ŝanĝi lin en estaĵon feliĉan, ĝojan, senzorgan. La granda dio ankoraŭfoje favoris la belan Eosan kaj aliformigis Titonon en cikadon. Tiele ekaperis la ĉiam gaja insekto, kiu senĉese kaj senlace kantas, ĝuante la someran varmon.

De Titono Eosa naskis du filojn, Emationon (Ημαθίων) kaj Memnonon (Μέμνων). La unua, kiu estis reĝo de Etiopujo, senpripense enmiksiĝis kontraŭece en aferojn de la granda heroo kaj duondio Heraklo (Ηρακλής) kaj tiale li estis mortigita. Idoj de tiu Emationo, vagante en Helenujo, iam atingis Macedonion (Μακεδονία), kie ili fondis regnon, en regiono al kiu, omaĝe al sia patro, ili donis la nomon Ematio (Ημαθία).

Memnono sekvis post Emationo en la reĝeco de Etiopujo. Tiu Memnono estis eksterordinare bela viro; oni diradis ke li estas la plej bela mortemulo de ĉiuj epokoj. Li estis Etiopo, do, li estis brunhaŭta. Mi diras tion, ĉar la nomo Etiopo (Αιθίοψ), devenanta de la helena, estas kunmeto de la vortoj “αίθω “ (=bruli) kaj “οψ “ (=vizaĝo). Tiu Memnono, la brunhaŭta kaj eksterordinare bela junulo estis ankaŭ laŭ la karaktero, ecaro kaj farmaniero nobla kaj pro tio amata al ĉiuj. Eosa ekscese amis tiun sian filon kaj deziris ĉiam lin atenti kaj protekti. Malgraŭ tio, ŝi ne povis malhelpi, ŝi ne povis ŝanĝi la planojn de la amata filo kiam li decidis ekspedicii kun la etiopa armeo al Trojo (Τροία), por partopreni, ĉe la flanko de la Trojanoj, la grandan militon kontraŭ la Helenoj. Memnono, kiu, krom ĉio alia, estis aventurema kaj kuraĝa viro, decidis enmiksiĝi en la grandan militon kiam atingis lin la lasta malespera peto de la maljuna troja reĝo Priamo (Πρίαμος), kun la terura novaĵo pri la mortigo de la granda heroo, estro de la troja armeo, Hektoro (Εκτωρ), lia malnova, tre bona amiko. Malgraŭ la kontraŭiĝo, la konsiloj, la petegoj de sia patrino, Memnono, estrante la multenombran armeon de la Etiopoj, atingis Trojolandon. En la komenco la alveno de novaj, tre fortaj aliancanoj levis la kuraĝon kaj donis novajn esperojn al la Trojanoj kaj sekvis sufiĉaj iliaj venkoj. Tio daŭris ĝis kiam Memnono, batalante kuraĝe antaŭ siaj oficiroj, tute hazarde troviĝis antaŭ unu el la plej distingitaj helenaj armeestroj, antaŭ Antiloĥo (Αντίλοχος), la filo de la maljuna, saĝa Nestoro (Νέστωρ), reĝo de Pelo (Πήλος). Notinde, ke tiu Antiloĥo estis intima amiko de la nevenkebla kaj nevundebla granda heroo Aĥilo (Αχιλλεύς). Memnono sentime staris antaŭ la forta



helena estro, li alfrontis lin kuraĝe kaj fine li sukcesis mortigi lin. Tio estis granda damaĝo por la helena flanko; en la komenco ĝi kaŭzis malĝojon kaj senkuraĝiĝon, sed, tuj pli poste, koleron kaj indignon, speciale la indignon de la terura Aĥilo. La neretenebla militisto sin ĵetis en la batalkampon, li

enmiksiĝis en sinsekvajn kruelajn batalojn, li mortigis multajn malamikojn, ĝis kiam la sorto kondukis lin antaŭ la bela etiopa militestro, la mortiginto de lia amiko. Kompreneble sekvis duelbatalo, senbride perforta. Memnono batalis forte kaj kuraĝe, tamen li falis!

Kiam tio okazis, nigraj nuboj kovris la tutan ĉielon; la agackaŭzaj vekrioj, la korŝira lamentado de la malfeliĉa patrino sonis tra la tuta mondo. Eosa sin ĵetis sur la batalterenon, ŝi levis la senvivan korpon de sia adorata filo kaj ŝi mem transportis ĝin al la suba mondo. Tie, ŝi restis tute sola super la mortinto, ŝi sencese ploris, ŝi lumis nur la karan sian filon, nenion alian. Dume, en la supra mondo regis mallumo, estis nur nokto; ne mateniĝis plu. Eosa ne aperis kaj Selena ne povis deiri, kaj Helio ne plu povis sekvi la rozajn spurojn de sia antaŭiranta fratino, do, ankaŭ li ne aperis. Zeŭso maltrankviliĝis, li sendis heroldojn kun petoj, kun konsiloj, kun severaj ordonoj, tamen nenia forto povis eltiri la malfeliĉan patrinon el la adorata morta filo. Zeŭso ne povis uzi perforton, kompreneble nenio povas devigi la lumon aperi, do, la direĝo, ankoraŭfoje saĝe decidis, li donacis al Memnono la senmortecon, la belega filo estis kondukita al Elizeo (Ηλύσια Πεδία), al la mondo de la eterna feliĉo kaj la patrino, ankoraŭfoje favorita de la dipatro, tute kontenta, revenis al sia bela tasko.

Tiu ĉi historio pri Memnono estis parenteze metita ĉi tie, mi, do, devas tuj reveni al la ĉefa temo, kiu estas la sinsekvaj, ĉiam malbonfinaj amoraj historioj de la bela rozafingra Eosa. Mi diru, ke post Titono kaj kelkaj aliaj beluloj, sur la amora scenejo de Eosa venis alia tre bela viro, la giganto Oriono, tre



lerta kaj tre fama ĉasisto kaj pro tio amata al Artemisa (Αρτεμις), la diino de la ĉaso. Oriono estis filo de Pozidono (Ποσειδών), la majesta dio de la maro, sed li estis heredinta de sia patro nur la kapablon marŝi sur la maro. Pro sia neordinara beleco Oriono havis multajn kaj sukcesajn amaventurojn, li ĝuis la amon de multaj, tre belaj, virinoj, sed li ordinare preferis okupiĝi pri amaferoj malfacilaj, komplikaj, ne ordinaraj. Li iam hazarde renkontis Plejonan (Πλειόνη), la belegan edzinon de Atlaso (Ατλας), la titano kiu estis kondamnita teni sur siaj ŝultroj la teron. Kiam Oriono vidis Plejonan, kiu kun siaj sep, same belaj, filinoj, vagadis tra la mondo, ŝin arde ekamis. Li deziris kaj preme provis kuniĝi kun ŝi, sed la virino kontraŭstaris kaj forkuris. Oriono ne lasis ŝin trankvila, li komencis kursekvi ŝin, li ne ĉesis klopodi ŝin akiri, li uzadis artifikojn, insidojn, ruzaĵojn, li persekutadis longe la virinon, kiu, vidinte ke ŝi ne evitos la senhonorigon, petis la helpon de la dioj. La dioj favoris kaj savis ŝin, ili forprenis kaj pendigis ŝin kaj ties filinojn sur la ĉielo; tiele estis kreita la stelaro Plejado (Πλειάδες), kies ĉiam klare videblaj estas sep steloj, kompreneble la brilaj, belaj filinoj de Atlaso. Kiam Oriono perdis definitive tiun sian amatan virinon, daŭrigis la ĉasvagadon tra Helenlando kaj iam atingis la insulon Ĥioso (Χίος), kie li estis gastigita de la loka reĝo Ojnopso (Οίνωψ). Tie, post nelonge, la varm-temperamenta bela junulo enamiĝis, ankoraŭfoje same fervore, al la filino de la reĝo, Meropa (Μερόπη). Ŝajnas, ke la flamiĝema kaj atakema karaktero de nia heroo timigis la prudentajn virinojn, ĉar ankaŭ Meropa ne cedis al lia insista amindumado. Tiel, unu nokton, Oriono, kiu krom la virinoj amis multe la vinon, ebriiĝinte post diboĉo, surprizis kaj seks-perfortis la reĝidinon. La reĝo kompreneble indignis, sed li ŝajnis, ke li scias nenion pri la terura ofendo. Do, la morgaŭan tagon li invitis Orionon en bankedo, li ebriigis lin multe kaj poste li blindigis kaj forĵetis lin al fora marbordo de sia insulo. La malfeliĉa Oriono,

multe suferante kaj ne povante scii kie li estas, eniĝis en la maron kaj komencis marŝadi sur ĝi, sed li ne povis sin orienti. Tamen, iam li aŭdis klare sonon de martelbatoj, tiel li tre ĝuste supozis, ke li estas proksime al la najbara insulo Lemnoso (Λήμνος), kie estis la restadejo kaj la laborejo de Hefesto (Ηφαιστος), la granda dio de la fajro kaj metalforĝado. Li ne eraris, li aliris al la dio, kiu bonvole donis al li akompananton, kiu kondukis lin sekure al la bonkora, ĉiam gaja kaj bonhumora Helio. La brila dio, tre bona amiko de la mastro de la maro, cedis al la petoj de ties filo kaj li redonis al li la vidkapablon. Tiam, Oriono komencis denove vagati, tiun fojon serĉante sian malamikon, Ojnopson, kiu tamen estis tre bone kaŝita. Estis tiam, do, kiam Eosa, kiu post Titano estis spertinta kelkajn ankoraŭ amojn sed ne iun tre grandan, renkontis Orionon. La voluptavida diino, kiu ĉiam sopiradis je la unika amoranto, tuj enamiĝis al la bela ĉasisto, kiu entuziasme reciprokis kaj sekvis la splendan virinon al ŝia brila palaco. La geamorantoj longe ĝuadis sian amon, ili ambaŭ estis feliĉaj kaj tio, kompreneble, plaĉas al ni ĉiuj, tamen ni devas ne forgesi la malnovan, fatalan malbenon de Afrodita. Oriono avide ĝuadis la dulcecon de sia amatino tamen li daŭrigis sian ŝatatan okupiĝon, la ĉasadon. Kiam Eosa estis malproksime de ilia am-nesto, li vagadis sur la montoj, en valoj kaj arbaroj kaj ĉasadis, akompanata de malproksime de la diino Artemisa, kiu admiris la belan ĉasiston pro lia neordirara ĉaslerteco, eble ankaŭ pro lia beleco. Unu tagon, post longa ĉasado, Oriono kusiĝis en ombrejo por iom ripozi. Tiam, eksterordinare granda skorpio de nekonata specio, elirinte el ŝtonamaso, pikis lian piedon. Tio sufiĉis, la neordinare drasta veneno de la stranga skorpio en nur kelkaj momentoj mortigis Orionon!

La homoj diradis, ke estis la dio Apolono (Απόλλων), kiu sendis la venenan skorpion, kaj ke li faris tion por protekti sian fratinnon Artemisan. La diino de la ĉaso kaj ĉasteco estis kaj devis resti eterne virga kaj Apolono, kiu konstatis ŝian eksterordinaran simpation al Oriono, pensis, ke tiu, tiom bela kaj kapabla en la ĉasado viro, estas la sola, kiu povus delogi kaj malvirgigi la ĉastan diinon.

Mi ne scias kiu sendis la skorpion, mi nur scias, ke sekvis nova, neretenebla lamentado, nova malfeliĉiĝo de Eosa, kiu, tiun fojon devigis Zeŭson meti Orionon sur la ĉielo, igi lin unu el la plej long-dimensiaj kaj imponaj konstelacioj. Kaj tiuj, kiuj kutimas observadi la stelojn, diras, ke Oriono, sur la ĉielo, kiel ekvatora konstelacio, tute evitas sian grandan malamikon, Skorpion, kiu staras malproksime, kiel aŭstrala konstelacio.

Tamen, ni lasu la stelojn kaj ni revenu al la

splenda, ĉiam soifanta la viran amon, diino. Mi scias, ke sekvis kaj ĉiam sekvas multaj ankoraŭ amorantoj, inter kiuj notinda estas unu ankoraŭ, tre bela viro, nomata Klejto (Κλειτος), kiu mortis sed iĝis senmorta, kaj Cefalo (Κεφαλος), filo de la dio Hermeso (Ερμης), la sola amoranto de Eosa kiu ne mortis, sed forlasis ŝin, preferinte sian edzinon, kiun verŝajne li amis pli multe.

Tia estis la sorto de Eosa, kiu unuavide ŝajnas trista. Mi diras “unuavide”, ĉar mi konas multajn

virinojn, kiuj kredas, ke Afrodita ne malbenis, kontraŭe ŝi benis Eosan, kiu havas la eblon sperti, eĉ sen ia kulp-sento, la amoron de multaj, eĉ belegaj, viroj. Kiu rajtas, kiu povas kontraŭdiri al la sinjorinoj, kiuj pensas tiele, kiuj opinias, ke la ĝuado de multaj amoroj ne povas esti nur vira privilegio? Mi, ne!

verkis **Spiros Sarafian** el Grekujo
(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)

Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo

-- el retejo OLE

Edwin de Kock

En 2007 aperis nova poemlibro, Sub fremdaj ĉielo, de Edwin de Kock, la deka ekde lia unua poemaro Ombroj de la kvara dimensio (1961) pri kiu mi skribis sen ajna hezito en la tiama revuo Norda Prismo: “Per ĉi tiu libro Edwin de Kock nekontesteble pravas, ke li jam



apartenas al la frontvico de la malgranda taĉmento de seriozaj Esperanto-verkistoj.” Edwin kaj mi estas samaĝanoj, naskitaj en 1930, kaj jam antaŭ la aperigo de tiu lia unua libro ni estis leteramikoj, ambaŭ junaj kaj poete ambiciaj. La cititaj vortoj, skribitaj en flagranta entuziasmo pri la verko de mia amiko, pruviĝis daŭre kaj plene veraj: Edwin de Kock jam antaŭ longe certigis al si lokon kiel unu el la plej originalaj kaj fekundaj poetoj en Esperanto.

Edwin de Kock estis Sudafrikano ĝis sia transloĝiĝo al Usono antaŭ 15 jaroj. En Sudafriko li laboris kiel docento pri la angla kaj afrikansa lingvo. Li lernis Esperanton en 1955 kaj jam tiam komencis verki poemojn en la internacia lingvo. Li estis redaktoro de sudafrikaj Esperanto-revuoj kaj kontribuis al tiama internaciaj literatur-revuoj Norda Prismo kaj La nica literatura revuo.

Mi jam menciis poetan ambicion. Ambicio ĉe poeto estas bona afero, se ne temas pri ambicio de konkurado kun aliaj, sed pri persona, sana ambicio bazita sur propraj potencialoj kaj konvinkoj. Jam en sia unua poemlibro riveliĝas la poeta ambicio de Edwin de Kock, tie svarmas ideoj kaj originalaj bildoj, kaj evidentas lia aspiro serĉi kaj trovi vojon al kreo de granda poezio. Tio ekzemple estas konstatebla en poemo titolita Kristaliĝo:

*Akvo de la vivparolo
en la klara lumo bruas,
pro la ĝojo, tristo, folo;
kaj la riverego fluas
al la maro de silento.
Sed kaptite inter rokoj,
al la kuro de l' torento
kaj la plaŭdmortantaj vokoj,
vortoguto malleviĝas
korkavernen kiel semo –
kreske post la jaroj iĝas
stalaktito de l' poemo.*

Tiu ambicia celo de Edwin de Kock evoluis tra la sekvaj poemaroj, Fajro sur mia lango (1967) kaj Kvin elementoj (1970), kaj kulminis en la vaste konceptita, sed ankoraŭ nefinita eposo La konflikto de la epokoj (Libro 1, 1984, Libro 2, 1985). Tie religio havas gravan funkcion en intima ligo kun la emocia naturo de la poeto mem. Libro 1 priskribas sciencfikcian vojaĝon de la poeto tra la tempo en akompano kun Lucifero, meditado pri Dio kaj la diablo kaj pri la konceptoj de boneco kaj malboneco. Libro 2 prezentas la filozofion de la poeto en ligo kun okazoj en Palestino en la tempo de la Biblio. Entute tiuj du unuaj libroj de la eposo ampleksas pli ol tri mil versojn. Plenumo de la impona plano de la poeto pri tri pliaj libroj ankoraŭ atendas publikigon.

Pliaj poemaroj de Edwin de Kock estas certe menciindaj: Plukonstrue (1975), Japaneskoj (1982), Saluton al la suno (1983) kaj Vojaĝoj kaj aliaj poemoj (1992). Lia lasta, Sub fremdaj ĉielo, havas apartan rolon en la verkaro de Edwin. Ĝi ne nur enhavas sufiĉe grandan faskon da poemoj – entute 51 – sed ankaŭ kvin prozajn verkojn sub la komuna titolo Pri kaj ĉirkaŭ Edwin de Kock. Tiuj prozaj verkoj enhavas membiografiajn tekstojn de la poeto mem kaj verkaĵojn de homoj, kiuj konas lin intime kaj havas multon interesan por diri pri tiu eksterordinara homo. Efektive la libro estas unika en Esperanto en tiu senco, ke ĝi

enhavas kvazaŭ “testamenton” de poeto, kiu prave opinias, ke por plena kompreno de lia originala verkaro necesas raporti laŭeble komplete pri lia vivo, liaj cirkonstancoj, liaj konfliktoj, liaj kredoj, liaj konvinkoj. La poemoj estas plej multaj verkitaj ekde 1995 post la transloĝiĝo de la poeto al Usono. La temoj de la poemoj estas variaj: de dolora indigno kontraŭ mistraktoj kaj kruelaĵoj de homoj al homoj – kie elstaras “Rekviemo por la Albigensoj”, dolora meditado pri la krucmilito de la Papo kaj la franca reĝo kontraŭ la herezaj Albigensoj en suda Francujo 1209-1229 -, ĝis nostalgio de la poeto por sia antaŭa hejmlando, kuniĝe kun la fakto de pliaĝiĝo, kiel ekzemple en tiu ĉi tankao:

*En la momenton
saltas dista memoro.*

*Ne, ne, oldulo!
Forpasis tute tiuj
korlando, homoj, horo.*

Venontjare Edwin de Kock festos sian okdekjariĝon. Kvankam ni eble havas lian poetan “testamenton” en lia lasta libro, ni povas fidi, ke li plue havas multon valoran por diri al la legantoj de siaj poemoj.

de **Baldur Ragnarsson**


(**Juna amiko**, n-ro 124, aprilo 2009)

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/tekstoj/ragnarsson/dekock.html>

Mia kapo doloras!

-- amuze rakontas Maurizio Brucco el Britio

Ĉi-nokte mi ne povis dormi pro ĉi tiu bildo. Mi serĉis la plej bonan manieron por esprimi per vortoj tion, kion la fotografaĵo reprezentas.



Do, unue ni konsideru ke tiu vitro de la fenestro estas travidebla, kaj oni povas vidi tra ĝi. Sed samtempe ĝi funkcias kiel spegulo, do oni povas vidi sin mem. Kaj ni supozu ke ĝi funkcias tiel ambaŭflanke.

Nun, ni konsideru la katan vidpunkton: la kato vidas sin kaj ŝin. Kaj la kato vidas sin kiel kato vidus ĝin kaj same kiel infano vidus ĝin. Alivorte, la kato vidas katon. Sed samtempe, ŝajnas kvazaŭ ĝi estus la infano, do la kato vidas sin kiel infano vidus sin aŭ kiel kato vidus ŝin. Alivorte, la kato vidas infanon. Konkludante, la kato vidas sin kaj ŝin kiel infano kaj kiel infanon.

Nun, la afero komplikiĝas. Ni konsideru la infanan vidpunkton. La infano vidas sin kaj ĝin. Kaj la infano vidas sin kiel infano vidus ŝin kaj same kiel kato



vidus ŝin. Alivorte, la infano vidas infanon. Sed samtempe, ŝajnas kvazaŭ ŝi estus la kato, ĉar la reflektoj konfuziĝas kaj miksiĝas. Do la infano vidas sin kiel kato vidus sin aŭ kiel infano vidus ĝin. Alivorte, la infano vidas katon.

Unuigante la du vidpunktojn, ni povus diri ke: la kato vidas sin kaj ŝin kiel infano kaj infanon, kaj la infano vidas sin kaj ĝin kiel kato kaj kiel katon. Ĉu ne?

Mia kapo jam doloras pro tio!

La dometo de feliĉo

tradukis kaj sendis Antanas Vaitkevičius el Litovio

Siringoj

*Kiam mi ne ekzistis,
Siringoj jam floris.
Kiam mi ne ekzistos,
Ili estos en flor'.
Falos la petoletoj
Pro sun' kaj venteto,
Kvazaŭ tombsableretoj
Sur mian la kor'.*

-- poemo de Saloméja Nėris el Litovio

tradukis kaj sendis **Antanas
Vaitkevičius** el Litovio



ANSEROJ

fablo de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio

Per longa vergo kamparan'
Anseran gregon en la urbon pelis
Kaj per la verg' sufiĉe li kruelis,
Ne tro ĝentilis li per sia man':
Rapidis li al la foira tag'.
Kaj se afer' koncernas la profiton,
Ne nur anserojn, eĉ la hom-meriton
Ne tro respektas ni en nia ag'.
Sed la Anserojn malĝentil' ofendis
Kaj al pasanto iu sur la voj'
Pri kamparana krudo ili plendis:
"Jen estas ni mizeraj, en malĝoj',
Nin pelas Kamparan' perforte, kun turmento,
Ja kvazaŭ estas ni ansera simpla gento,
Sed ne komprenas li, malsaĝa stulta hom',
Ke devas li respekti nin humile,
Ke nia nobla gent' devenas ja el Rom',
Savita de Anseroj tiom brile:
Ĝis nun en Rom' anserojn oni festas!"
"En kiu tamen fakt' merito via estas?"
"Sed nia praŭlar'..." — "Mi tion bone konas,
Pri tio legis mi, sed scii mi bezonas,
Per kia utilec' persone vi ekgravis?"



"Sed nia praŭlar' sukcese Romon savis!"
"Kaj kia bona ag' distingas vin persone?"
"Nenia ag'. " — "Sed kia do valor'?"
Mencias vi praŭlojn senbezone:
Por ili restu la honor',
Kaj taŭgas vi nur por rostaĵ' plejbone."
Pritraktus mi aferon laŭ merit'
Sed timas pri anser-incit'.

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)
Ukrainio

Amuza Matematiko

-- tradukis kaj sendis Bardhyl Selimi el Albanio

*Tipo de Diofantaj * problemoj, tio estas kiam estas malpli da ekvacioj ol nekonataj variabloj*

Oraj taleroj



80 personoj (viroj, virinoj, infanoj) gajnis 200 orajn talerojn. Ĉiu viro gajnis 6 talerojn, ĉiu virino 3, ĉiu infano 1. Kiom da viroj, virinoj, infanoj estis respektive?

Solvo de Weber (jaro 1737):

Ni notu per x la nombron de viroj, per y tiun de virinoj. Tiam la nombro de infanoj estas $80 - (x + y)$
Laŭ la kondiĉo

$$6x + 3y + 1(80 - x - y) = 200$$

Tio kondukas al

$$5x + 2y = 120.$$

Nun ni serĉu naturajn valorojn por x kaj y , ĉar ties nombroj estas ja entjeroj, ne negativaj.

Estas multaj solvoj, jen kelkaj:

infanoj virinoj viroj

50	10	20
53	5	22
47	15	18
44	20	16
41	25	14
38	30	12
35	35	10
36	40	8
29	45	
26	50	4
23	55	2

* *Diofant/o*. Greka matematikisto (ĉ. 246—ĉ. 330).
diofanta Δ

a) (pp ekvacio) Havanta entjerajn aŭ racionalajn nekonatojn.

b) (pp proksimumigo) Tia, ke oni serĉas racionalajn proksimumajn solvojn.



Franco KAFKO (Franz Kafka) *
La transformiĝo (parto 7)
(daŭrigata)



Pasis momenteto, Gregoro kuŝis tie elĉerpita, ĉirkaŭe estis silente, eble tio estis bona signo. Tiam oni sonis. La knabino estis kompreneble enŝlosita en sia kuirejo, kaj pro tio devis iri Greta por malfermi. Estis veninta la patro. "Kio okazis?"

estis liaj unuaj vortoj; supozeble la aspekto de Greta malkaŝis al li ĉion. Greta respondis per obtuza voĉo, evidente ŝi premis sian vizaĝon al la patra brusto: "La patrino estis svena, sed ŝi fartas jam pli bone. Gregoro elkuris." "Mi ja atendis tion", diris la patro, "mi ja ĉiam diris al vi tion, sed vi virinoj ne volas aŭdi." Al Gregoro estis klare, ke la patro malbone interpretis la tro mallongan informon de Greta kaj ke li imputis al Gregoro ian perfortaĵon. Tial Gregoro devis nun zorgi por mildigi la patron, ĉar por klarigi li havis nek tempon nek eblon. Kaj tiel li fuĝis al la pordo de sia ĉambro kaj premis sin al ĝi, por ke la patro enirante de la antaŭĉambro jam povu vidi, ke Gregoro havis la plej bonan intencon tuj reiri en sian ĉambron kaj ke ne necesis lin repeli, sed ke sufiĉis malfermi la pordon, kaj li estis tuj malaperonta.

Sed la patro ne estis en la taŭga humoro por rimarki tiajn subtilaĵojn; "Ha!" li jam kriis enirante per tono, kvazaŭ li estus samtempe kolera kaj feliĉa. Gregoro retiris la kapon de la pordo kaj levis ĝin kontraŭ la patron. Tian li vere ne estis imaginta la patron, kia li nun tie staris; estas vere, ke en la lasta tempo, pro la novstila krablado, li preterlasis atenti, kiel antaŭe, la okazantaĵojn en la cetera loĝejo, kaj envere li devis esti preparita por renkonti ŝanĝiĝintajn kondiĉojn. Tamen, tamen, ĉu tio estis ankoraŭ la patro? La sama viro, kiu kuŝis laca, enfosiĝinta enlite, kiam Gregoro antaŭe estis foririnta al komerca vojaĝo; kiu lin ĉe vesperoj de reveno akceptis en negliĝo en apogseĝo; ne vere kapabla leviĝi, sed kiel signo de ĝojo nur levis la brakojn kaj kiu dum la maloftaj komunaj promenadoj kelkajn dimanĉojn en la jaro kaj je la plej altaj festotagoj, inter Gregoro kaj la patrino, kiuj jam pro si mem iris malrapide, ankoraŭ iom pli malrapide, enpakite en sia malnova mantelo, per ĉiam prudente metata lambastono sin antaŭen laboris kaj, kiam li volis ion diri, haltis kaj kolektis sian

akompanantaron ĉirkaŭ si? Sed nun li estis sufiĉe bone rektiĝinta; vestita en streta blua uniformo kun orbutonoj, kiel ĝin portas servistoj de la bankinstitutoj; super la alta rigida kolumo de la jako evoluis forta duobla mentono; el sub la faskecaj brovoj la rigardo de la nigraj okuloj penetris freŝe kaj atente; la alitempe taŭzita blanka hararo estis malsupren kombita al precizega, brilanta hardislama aranĝo. li ĵetis sian kaskedon, sur kiu estis aldonita ormonogramo, verŝajne tiu de banko, tra la tuta ĉambro laŭarke sur la kanapon kaj iris, kun rebatitaj baskoj de sia longa uniformjako, la manojn en la pantalonpoŝoj, kun obstina vizaĝo direkte al Gregoro. Eble li mem ne sciis, kion fari; tamen li levis la piedojn nekutime alten, kaj Gregoro miris pri la grandeco de liaj botplandumoj. Sed je tio li ne haltis, li sciis ja de la unua tago de sia nova vivo, ke la patro, koncerne lin, opiniis taŭga nur la plej grandan severon. Kaj tial li kuris antaŭ la patro, hezitis, kiam haltis la patro, kaj jam antaŭen rapidis, kiam la patro nur moviĝis. Tiel ili faris plurfoje rondon tra la ĉambro, sen ke okazis io decida, ja eĉ sen ke la tuto, pro la malrapideco de la procedo, havis la aspekton de persekuto. Ankaŭ pro tio Gregoro restis provizore sur la planko, tiom pli ke li timis, ke fuĝon surmuran aŭ eĉ surplafonan la patro povus opinii aparta maliciaĵo. Tamen Gregoro devis konsciiĝi, ke li eĉ tiun kuradon ne longe eltenus; ĉar dum la patro faris paŝon, li devis plenumi sennombrajn movojn. Jam sentiĝis sprimanko, kiel li ja ankaŭ en pasintaj jaroj posedis ne tute fidindan pulmon. Kiam li nun tiel antaŭen ŝanceliĝis por kolekti ĉiujn fortojn por la kuro, apenaŭ tenis la okulojn malfermaj; en sia obtuzo tute ne pensis pri alia savo ol per kuro; kaj preskaŭ jam forgesis, ke la muroj estis je lia dispono, kvankam tiuj estis ĉi tie baritaj per zorge skulptitaj mebloj plenaj je dentaĵoj kaj pintoj - tiam flugis io malsupren ĝuste apud li, malforte ĵetita kaj ruliĝis antaŭ lin. Estis pomo; tuj dua flugis post ĝi; Gregoro, terurigite, haltis; plua kuro estis sensenca, ĉar la patro decidis lin bombi. El la fruktpelvo sur la telermeblo li estis pleniginta siajn poŝojn kaj ĵetis nun, provizore sen vere celi, pomon post pomo. Tiuj ruĝaj pometoj ruliĝis kvazaŭ elektrigitaj ie sur la planko kaj interpuŝiĝis. malforte ĵetita pomo laŭglitis la dorson Gregoran, sed defalis sen difekti. Tuj sekvanta male vere penetris en la dorson Gregoran; Gregoro volis sin plutreni, kvazaŭ la surpriza nekredbla doloro povus foriĝi per la lokŝanĝo; sed li sentis sin kiel najlofiksita kaj streĉis



sin en kompleta konfuziĝo de ĉiuj sensoj. Nur per lasta rigardo li ankoraŭ vidis, kiel la pordo de lia ĉambro ŝire malfermiĝis kaj antaŭ la krianta fratino elrapidis la patrino, en ĉemizo, ĉar la fratino ŝin malvestintis por ebligi al la sveninto liberan spiron; kiel poste la patrino alkuris la patron kaj survoje la mallaĉitaj jupoj unu post la alia plankenglitis, kaj kiel ŝi, stumblante super la jupoj, trudiĝis al la patro kaj, lin ĉirkaŭbrakante, en kompleta unuiĝo kun li - sed nun jam cedis la vidpovo Gregora - kun la manoj ĉe la postkapo de la patro petis indulgi la vivon de Gregoro.

III

La grava vundiĝo, pro kiu Gregoro suferis pli ol monaton - la pomo restis, ĉar neniu kuraĝis ĝin forigi, kiel videbla memoraĵo enkarne -, ŝajnis esti eĉ la patron konsciiginta pri tio ke Gregoro estis, spite sian nunan tristan kaj naŭzan figuron, membro familia, kiun oni ne rajtis trakti kiel malamikon, sed rilate al kiu estis familia devo forgluti la antipation kaj suferi, nenio ol suferadi.

Kaj kvankam Gregoro pro sia vundo nun estis perdinta multon da moviĝo, verŝajne por ĉiam, kaj provizore por trairi la ĉambron kiel maljuna invalido bezonis lingajn, longajn minutojn - krablado en alto ne estis pensebla -, li ricevis por tiu malboniĝo de sia stato kompenson siaopinie tute sufiĉan per tio, ke ĉiam vesperiĝe la salonpordo, kiun li jam unu aŭ du horojn antaŭe kutimis precize observi, malfermiĝis, tiel ke li, kuŝante en la mallumo de sia ĉambro, nevidate de la salono, povis vidi la tutan familion ĉe la prilumata tablo kaj, kvazaŭ per ĝenerala konsento, do tute alie ol antaŭe, aŭskulti iliajn paroladojn.

Certe tio ne plu estis la viglaj babiladoj de tempoj iamaj, pri kiuj Gregoro en hotelĉambroj ĉiam pensis kun ioma sopiro, kiam li, laca, estis devigata ĵeti sin en la malseketan littolaĵon. Nun la vespero pasis plejparte nur tre silente. La patro endormiĝis baldaŭ post la vespermanĝo en sia brakseĝo; la patrino kaj la fratino reciproke admonis sin al silento; la patrino kudris, ege antaŭenklinite sub la lumon, fajnan tolaĵon por modbutiko; la fratino, dungita kiel vendistino, lernis vespere stenografion kaj la francan lingvon, por iam eble atingi pli bonan postenon. Kelkfoje la patro vekigis kaj, kvazaŭ li tute ne sciis, ke li dormintis, li diris al la patrino: "Kiom longe vi hodiaŭ ree kudras!" kaj tuj reendormiĝis, dum patrino kaj fratino sin lace alridetis.

Kun ia obstino la patro rifuzis eĉ hejme demeti sian servistan uniformon; kaj dum la negliĝa vesto pendis senule ĉe la vesthoko, la patro dormetis plene

vestita sur sia loko, kvazaŭ li estus ĉiam preta al sia servo kaj atendus ankaŭ ĉi tie la voĉon de la ĉefo. Sekve de tio la jam komence ne nova uniformo, malgraŭ ĉia zorgemo patrino kaj fratino, perdis multon da pureco, kaj Gregoro rigardis ofte tutajn vesperojn al tiu vestaĵo ĉie makulita kaj lumanta pro ĝiaj ĉiam poluritaj orbutonoj, kaj en kiu la maljuna viro ege malkomforte kaj tamen kviete dormis.

Tuj kiam sonis la deka horo, la patrinbo provis per delikata kuraĝigo vekti la patron kaj poste persvadi al enlitiĝo, ĉar tie ĉi ja ne estis vera dormo, kaj tiun la patro ege bezonis, kiu devis ekdeĵori je la sesa horo. Sed kun la obstino, kiu lin kaptis de kiam li estis servisto, li ĉiam insiste volis resti pli longe ĉetoble, spite ke li ĉiam endormiĝis, kaj poste nur per la plej granda penado povis esti instigata interŝanĝi la brakseĝon kontraŭ lito. Vane patrino kaj fratino per admonetoj ĉiom klopodis - dum kvaronhoroj li malrapide skuadis la kapon, tenis la okulojn fermaj kaj ne leviĝis. La patrino tiretis lian manikon, al li enoreligis flatvortojn, la fratino lasis sian taskon por helpi la patrinon, sed tio ne impresis la patron. Li nur des pli enprofundiĝis en la fotelon. Nur kiam la virinoj prenis lin sub la aksejoj, li malfermis la okulojn, rigardis sinsekve al la patrino kaj la fratino kaj kutime diris: "Jen vivo. Jen la tranvilo de miaj maljunaj tagoj." Kaj, apoge sur la du virinoj, li leviĝis pene, kvazaŭ li estus la plej granda ŝarĝo por si mem, lasis sin gvidi de la virinoj ĝis la pordo, tie rifuze mansignis al ili kaj nun memstare pluiris, dum la patrino urĝe deĵetis la kudraĵon, la fratino sian plumon, por postkuri la patron kaj plue esti al li helpaj.

(daŭrigota)

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/transformigxo.html>

(Scienc-fikcia rakonto laŭ grekaj antikvaj legendoj)

ANTAŬ TRE LONGE

Antaŭ miloj da jaroj, kiam la historio de la homaro apenaŭ komenciĝis, la Teron vizitis aliplanedanoj, kiuj similis homojn. Iliaj korpoj estis ĉiam junaj kaj belaj, krom kiam ili intence volis igi sin aspekti kiel abomenindaj monstroj, por timigi la homojn. Ili nek maljuniĝis, nek malsaniĝis, nek sentis fizikajn dolorojn. Ili kapablis vojaĝi facile kaj rapide inter planedoj kaj galaksioj. En ilia komunumo, la nivelo de la scienco estis miloble pli alta ol la iama nivelo de la antikvaj homoj sur la Tero. El multaj vidpunktoj, iliaj sciencaj konoj kaj ilia teknologio ege surpasis eĉ niatempan kulturon. Iliaj karakteroj similis tiujn de la teranoj. Do, tiuj aliplanedanoj kapablis mensogi, envii, avari, ekkoleri, kalumnii, ŝteli, murdi ktp. Sed ili kapablis ankaŭ ami, kompati, entuziasmiĝi pri io bela, malavari, sincere amikumi, helpi, teni siajn promesojn ktp. La rilatoj inter tiuj aliplanedanoj kaj la antikvaj teranoj estis tre diversaj. La aliplanedanoj ofte uzis hipnozon, kiel metodon por influi homajn sentojn, pensojn kaj agadojn. Ŝajnas ke tamen ili ne povis uzi la saman metodon por influi unuj la aliajn, do ene de ilia komunumo aperis oftaj konfliktoj. Iliaj hipnoz-influoj estis kelkfoje bonefikaj, aliffoje malbonefikaj por la koncernaj homoj. La aliplanedanoj kapablis fariĝi nevideblaj per la homaj okuloj, kiam ajn ili deziris. Ili ankaŭ kapablis aliformiĝi en aliajn estaĵojn por atingi siajn celojn.

Ŝajnas ke nun, tiuj aliplanedanoj ne plu troviĝas sur la tero. Oni ne scias, ĉu ili forlasis nian planedon definitive. Eble parto el ili revenos aŭ jam revenis. Iuj supozas, ke ili eĉ ne foriris, sed decidis kaŝi sin pro diversaj kialoj... Cirkulas centoj da rakontoj pri tiuj aliplanedanoj kaj miloj da supozoj. La antikvaj homoj nomis ilin "dioj" kaj "diinoj" kaj dediĉis al ili belajn templojn, el kiuj multaj daŭre konserviĝas.

daŭrigata



LA VIVO NE IRAS ĈIAM GLATE

Kutime la dioj konsideris sin mastroj de la homoj kaj kondukis al tiuj laŭ siaj kapricoj. Preskaŭ ĉiam la

dioj ordonis al la homoj, punis ties eventualan malobeemon kaj altrudis al ili sian volon. Tute malsimila estis la konduto de la naŭ instruistinoj el Parnaso. Tiuj amis kaj estimis la homojn, neniam altrudis sian volon. Per sia inspirmetodo, la naŭopo provis helpi la lernantojn memlerni, por ke tiuj spertiĝu pri diversaj artoj kaj sciencoj. La homoj admiris la instruistinojn kaj ĉiam bonvenigis ilin. Kiam oni admiras iun tutkore, oni klopodas simili tiun. Do, la homoj strebis fariĝi kiel eble pli saĝaj, pli sanaj, pli kreemaj kaj amemaj danke al la influo de tiuj ĉarmaj estaĵoj. Iom post iom, aperis eĉ homoj kapablaj inspiri aliulojn, ĉar normale tien kondukis ilin ilia deziro imiti la inspiristinojn. Do la naŭopo inspiris ankaŭ la arton kaj scienccon de pedagogio. Tiamaniere, parto el la lernantoj fariĝis instruistoj, kiuj instruis ontajn instruistojn, kiuj instruis ontajn ktp.



Intertempe, la plejmulto el la aliaj dioj kutime malŝatis la rapidan evoluon de la homa kreemo, ĉar ili ne volis, ke la homoj fariĝu iliaj rivaloj. Kaŝobservante la homojn, la dioj rimarkis, ke tiuj fariĝas pli kaj pli sanaj kaj belaj. Intertempe, la artecaj kreaĵoj fare de la homoj iĝis pli kaj pli emociigaj kaj parto el ili surpasis eĉ tiujn de la dioj mem. Ankaŭ la sciencaj kreaĵoj de la homaro estis evoluantaj rapide. La historiaj verkoj priskribis akurate kaj fidele ne nur la agadojn de la homoj, sed ankaŭ tiujn de la dioj. Tiuj ĉi ofendiĝis pro tio, ke la historiaj verkoj ofte priskribis ankaŭ iliajn difektojn kaj iliajn erarojn. Do, multaj dioj malkontentis pri la maniero laŭ kiu la naŭ fratinoj influis la homaron.

Zeŭso mem malkontentis pri la realigoj de siaj naŭ filinoj, precipe pri tiuj de Klio kaj Uranio. Zeŭso timis, ke Klio povus malkaŝi hontindajn eventojn el lia pasinteco, dum Uranio povus informi la homojn pri tio, ke lia regno ne estos eterna...

Iun tagon, Zeŭso alvokis ĉiujn diojn en sian majestan nuban palacon sur la Monto Olimpo. Tie li proklamis:

“Mi ordonas al vi kontraŭstari kaj puni la vantajn homojn, kiuj deziras fariĝi similaj al ni.”

LA LONGA KONFLIKTO

La plejparto de la dioj ekĝojis pri la decido de Zeŭso, ĉar ĝuste tion ili delonge deziris kaj eĉ instigis. Aliaj dioj simple indiferentis pri tio. Kelkaj bonkoraj dioj loĝantaj en arbaroj, riveroj kaj lagoj simpatiis la homojn, sed iliaj fortoj estis tre limigitaj kaj kutime ne kuraĝis kontraŭstari la tre potencajn diojn. Nur la naŭ instruistinoj el Parnaso aŭdacis senkaŝe malobei sian patron. Timiga kaj fortega estis Zeŭso, fulmon kaj

tondron li posedis kaj manipulis, sed kiam li vidis larmojn en la okuloj de siaj plej amataj filinoj, lia koro fandiĝis kaj tuj li fariĝis tolerema kaj pardonema... Tial Zeŭso kelkfoje ŝajnis ne rimarki la malobeemon de la naŭopo, kvankam li ja instigis la aliajn diojn detrui aŭ difekti multegajn homajn kreaĵojn... Do, la konduto de Zeŭso estis kaprica kaj malfacile antaŭvidebla, samkiel la ŝanĝanta montara vetero...

Ricevinte la ordonon de Zeŭso, multaj potencaj dioj interkonsentis difekti aŭ neniigi la homajn kreaĵojn kaj malhelpi la laboron de la naŭ instruistinoj. Arogantaj kaj ambiciaj dioj komencis aliformi pli kaj pli ofte la varman homan kompaton en egoisman kompaton de si mem. La sanigan homan ŝercemon, ili aliformis tre ofte en malican ironion. Pro la malicaj influoj de tiuj dioj, la rilatoj inter kreemaj homoj ofte ŝanĝiĝis draste: iliaj sentoj de admiro aliformiĝis en envion, ilia sincera helpemo aliformiĝis en malamikan kritikemon. Ambicio kaj egoismo pli kaj pli ofte aliformis la kreaĵojn kunlaboron en konkuradon. Tiel, kreemaj gekolegoj iĝis rivaloj. Kalumnioj kaj mensogoj venenigis pli kaj pli multajn homajn animojn. Famo kaj mono fariĝis la ĉefaj celoj de la homa kreemo. Por famo kaj mono, iuj dancistoj kaj muzikistoj fariĝis tiom ambiciaj kaj konkuremaj, ke ili preskaŭ aliformis siajn publikajn prezentadojn en sportajn atingojn. Iuj dancistoj iĝis maldikaj kiel skeletoj, por ke iliaj spinoj fariĝu pli kaj pli flekseblaj. Onidire foje, la spino de juna dancistino frakasiĝis sur la scenejo kaj ŝi restis tie senmova, dum la publiko estis aplaudanta, supozante ke ŝi atingis la plej artecan kurbigon de sia korpo... Iuj muzikistoj, trejniĝis ludante per siaj muzikiloj po multegajn horojn ĉiutage, ĝis la muskoloj de iliaj manoj difektiĝis. Aliaj ekzercis kantadon ĝis iliaj gorĝoj grave malsaniĝis. Por fariĝi famaj riĉaj kuiristoj, iuj elpensis allogajn sed malsanigajn manĝaĵojn, kiuj entuziasmigis la klientojn sed samtempe malsanigis tiujn. Por fariĝi famaj kaj riĉaj, iuj verkistoj ĉesis ajnan intencon pensigi aŭ emociigi la legantojn. Anstataŭe, ili klopodis distri la legantojn pere de kiel eble pli konsternigaj manieroj. Onidire iu poeto, ambiciante atingi eksterordinaran originalecon, sendis hazardan sinsekvon de vortoj al literatura revuo kaj subskribis ĝin. Ŝajnas ke tiel li akiris grandan prestiĝon kaj eĉ lanĉis novan literaturan modon... Novaj pentristoj kaj skulptistoj strebis atingi originalecon pere de sensecaj kreaĵoj, kies prezoj altiĝis kaj malaltiĝis subite laŭ la kapricoj de rapide ŝanĝeblaj modoj. Onidire, unu el tiuj "laŭmodaj" artistoj iĝis fama kaj riĉa vendante "pentraĵojn" fare de lia simio, kiujn li subskribis per sia propra nomo... Novaj malhonestaj politikistoj influis malhonestajn historiistojn. Tiuj ĉi prezentis la homan historion tiel, ke la homoj ne plu

lernu el ĝi kiujn erarojn oni devus eviti, sed kontraŭ kiuj devus venĝi unu generacio post la alia, senfine... Fiaj diktatoroj avidaj je famo kaj mono suferigis milionojn da homoj kaj instigis al longaj kruelaj militoj. Ankaŭ en landoj kie ekzistis demokratio, mensogemaj politikistoj trompis kaj suferigis siajn popolojn. Ju pli da militoj, des pli da armiloj estis bezonataj. Novaj sciencistoj kaj teknikistoj obsedantaj pri famo kaj mono uzis siajn talentojn por krei armilojn... Ju pli evoluitaj fariĝis la armiloj, des pli kruelaj fariĝis la militoj... Malicaj dioj detruis aŭ falsigis valorajn antikvajn dokumentojn atestantaj pri la veraj historiaj eventoj. Ili detruis aŭ falsigis ankaŭ dokumentojn antaŭvidantaj la estontecon de la homaro kaj disvastigis opiniojn de ĉarlatanaj astrologoj, kiuj devojigis la energiojn de la homoj.

Intertempe, la naŭ instruistinoj el Parnaso daŭrigis siajn kutimajn agadojn kuraĝe kaj vigle. Helpis ilin ilia patrino, Mnemozino. Tiu ĉi plifortigis la memorkapablojn de la etaj infanoj, tiel ke ili povu memori facile kaj neforviŝeble ĉion ajn, kion oni instruas al ili kun sincera amo kaj entuziasmo.


Zeŭso kaj aliaj kapricaj dioj ŝanĝis tre ofte siajn kondutojn koncerne la homojn, sed la naŭ instruistinoj restis ĉiam fidelaj al la homoj. Iom post iom, Klio komprenigis al la homoj la fakton, ke la tiel-nomataj "dioj" ne estis ĉiopovaj kaj ilia regno ne estis eterna. Danke al Klio, la homoj komencis paroli pri tio, ke la tutan universon regas iu potenca senkorpa mistero, kiu estas la eterna fonto de vivo kaj amo... La mondo ŝanĝiĝis... Venis tempo, kiam Zeŭso kaj liaj kapricaj familianoj tediĝis pri sia longa turisma vizito sur la tero, des pli ke ankaŭ la homoj reciprokis tiun tediĝon. Do la aliplanedanoj decidis forlasi la Teron kaj aliformiĝi en aliajn estaĵojn aliloke.

Jam pasis multaj jarcentoj de ilia foriro. Oni ne scias, ĉu ili intencas reveni. Aŭ eble ili jam revenis kaj kaŝiĝas? Iliaj iamaj influoj, ĉu bonaj ĉu malbonaj, daŭre konserviĝas en nia socia vivo.

Iuj supozas, ke la bonkoraj inspiristinoj fariĝis anĝeloj, por daŭre helpi la homaron. Eble ili ofte enkorpiĝas en homojn, kiuj vartas aŭ instruas infanojn stimulantemaj ties kreemon. Ĉu vi rimarkis, kiom multaj infanoj kapablas kanti, danci, pentri, modli, deklami, fabeli, prepari fruktosalatojn, konstrui kastelojn... Domaĝe ke tiom da kreemo ofte perdiĝas, kiam la infanoj kreskas kaj temptas ilin diversaj ambicioj... Ĉu ne?

(fino)

verkis kaj sendis **Luiza Carol** el Israelo



Erik Tantal

La Kimero

Rakonto el la estonteco

1-a Eldono 2020

Reta esploro

Ne estis facila afero gardi la superrigardon. Eĉ pli malfacile estis ĝustatempe ĉesigi la traserĉon. Sven jam spertis, ke dum la reta esploro li ofte miskonsumis siajn fortojn per malgravaĵoj. Tiam li direktis sian atenton

al pliaj interesaj temoj, kiuj cetere aperis sur la ekrano. La serĉilo trovis por la vorto 'kimero' pli ol 300 000 rezultojn. Unue venis informriĉaj tekstoj, kiuj klarigis la esprimon, kiu venas el la greka mitologio. Tie la kimero aperas kiel minacanta monstro por homoj, kun leona kapo sur korpo de kapro. Je la malantaŭa korpoparto estas vosto kun serpenta kapo.

Por biologoj la kimero estas organismo en kiu troviĝas ĉeloj de diversaj vivantaj estaĵoj. Tio signifas, ke ekz. homo, kiu ricevis sangan transfuzon, ankaŭ estas kimero. Sed ĉar la transfuzitaj sangaj ĉeloj estas malkonstruitaj post iom da tempo, la kimerstato ekzistas nur tre mallonge. Alia signifo de la esprimo 'kimero' estas 'iluzio' aŭ 'fantaziaĵo'.

La daŭrigita reta esploro aperigis multajn indikojn pri eksperimentoj de aliaj sciencistoj el la tuta mondo.

Krome troviĝis ankaŭ tekstoj, kiuj temis pri etikaj aspektoj. Aparte la projektoj, kiuj uzis simiajn embriojn kaj homajn ĉelojn, estis forte kritikataj. Sed ĝis nun oni ĉiam mortigis tiajn embriojn antaŭ la naskiĝo. En multaj landoj tiaj eksperimentoj estis strikte malpermesitaj. Sven baldaŭ rimarkis, ke li verŝajne bezonus multajn jarojn por tralegi ĉiujn tekstojn. Li klakis sur la opcio 'videoj' kaj ricevis riĉajn ofertojn. Sven nun vere spertis malfacilaĵojn, ĉar li devis ĉiam decidi, ĉu la informoj estis sinceraj aŭ ne.



Ĉu vere ekzistis realaj prototipoj por la multaj skulpturoj de la antikva Egiptujo, kiuj reprezentas kimerojn? Ĉu la Granda Sfinkso en Gizo ne nur estas fantaziaĵo? Ĉu la kreintoj eventuale estis eĉ eksterteruloj? Oni ja ne povas kredi ĉion, kion la aŭtoro Erich von Däniken asertas. Sed kial troviĝas tiom multe da homoj, kiuj kaptas tiajn ideojn kaj produktas tiajn ampleksajn prezentaĵojn? Sven forlasis tiajn interretajn paĝojn kaj provis denove koncentriĝi je pli fidindaj fontoj. Ĉiuokaze li nun disponis pri sufiĉa materialo por la venonta konversacio kun la kunstudentoj.

(daŭrigota)

verkis **Klaus Friese** el Germanio
(plumnomo **Erik Tantal**)

Astrologio kontraŭ Psikologio - Aŭgusto / Leonuloj



Laŭ la astrologiistoj la naskiĝintoj de ĉiu zodiaka signo havas karakteron propran je tiu signo. Jen laŭ ili la personeco de la « leonaj ». (Leonulo estis Hugo Chavez)

Noto : tiuj astrologiaj portretoj estas ĉerpitaj el libro de Joëlle de Gravelaine « Konu vin mem pere de via astra signo » aperita en Parizo en 1975.

*** Viroj :**

Korpo kaj sano

Lia paŝado estas supla, la longigas la paŝon kaj tenas sin rekte, la kapon iomete malantaŭen. Kiam li sidiĝas en fotelo, li faras tion kun tiom da senpeno kaj senhasto, kio evidentigas sian memcertecon.

Oni ofte rekonas lin per ties belega kaphararo.

La korpo estas harmonia kaj solide muskola.

La nazo emas estis platiĝinta, la vizaĝo kvadrata, makzelo forta, piedoj kaj manoj potencaj.

Laboregema tamen posedas rimarkindan rezistancon, kaj elĉerpas siajn sekvantojn per siaj postuloj, li devas lerni ne tro fari.

Kiel li reagas ?

„Mi“, tio estas kutima maniero lia komenci siajn frazojn. Interpunkciitaj poste per multnombraj „ci komprenas ?“ Demandaj kaj insistaj. Narcisismo unufanke, deziro estis komprenata kaj komuniki



aliaflanke. Oni diras lin fiera, sed oni akceptas facile tiun superecon, kiun li afiŝas kun simpleco kaj kun puranima aplombo.

Kapabla je grandaj sentoj, ege nobleca, sen iom ajn da etanimeco, lin animas ardo kaj malavaro, profunda sento pri justeco kaj idealismo verva kaj kuraĝa.

La malhela flanko estas emo al subitaj koleroj.

Dotita per inteligento klara, fleksebla, li aliras kaj komprenas la problemojn facile, kaj kun spirito sin teza kaj kreiva.

Lia persona „magnetismo“, donas al li allogpovon kaj naturan aŭtoritaton.

Je kio li taŭgas ?

Por sukcesi antaŭ ĉio. Li estas la viro de la vastaj iniciatoj, de la ampleksaj projektoj.

Li vidas amplekse kun la trankvila certo, ke la obstakloj ne povos lin haltigi.

Homo de spektaklo li sentas sin komforta sur scenejo aŭ sur tribunon. Li estas lerta aktoro (ofte iom troigantema), sed tio, kio interesas lin estas enscenigi, estri trupon, reĝisoro mem la spektaklon. Se li havas ambiciojn politikajn, li tre rapide celos la deputecon, la registaron, aŭ eĉ la plej altan rangon.

Kiel li amas ?

„Leono superba kaj malavara“, li ŝatas protekti la amatan virinon. Amanto arda, li radias kiel la suno, kaj se li foje bruligas, li ĝin sincere bedaŭras, ĉar li abomenas suferigi. Li estas tro memcentrita por ami en maniero absoluta, sed li igos la vivon agrabla por la virino, kiun li elektos. Lia fideleco ne estas certa.

*** Virinoj :**

Korpo kaj sano

Kiel oni ŝin rekonas ? - Per ŝia beleco. Kiel la

viro de la signo, ŝia memcerta mieno, ŝia belstatureco, ŝia reĝeca kapteno kaj gazelaca irado logas la rigardon. Ŝi solide sanas, pli ol la viro, ŝi reagis pli bone ol li en la malbonsorto.

La sangocirkulado estas ŝia malforta punkto.

Kiel ŝi reagis ?

La leona virino estas brila, pasia, artista ĝis fingropinto, aŭ akstremita idealisma.

Ŝi ekardas, indigniĝas, fervoriĝas, defendas siajn geamikojn kaj ideojn, foje kun agresemo. Lojala, rektanima kaj fiero, oni povas kalkuli je ŝi. Ŝi ne havas tiun flankon „virinaĉa“, kiu ofte incitas la virojn. Ŝi emas aliri la grandajn temojn, kaj je ŝia penso, ne mankas forto.

Je kio ŝi taŭgas ?

Proksimume por la samaj aferoj kiel la viro de la signo. Eĉ politiko. Neniam imagante en aliuloj la sentojn, kiujn ŝi ne kapablas havi mem, ŝi foje estas malagrabla surprizita de la malico, ĵaluzo, aŭ envio, kiujn ŝi estigas ĉe aliaj.

Ŝi daŭre konservas faceton « eterna studentino » kaj tiam amas la diplomojn antaŭ ol trovi sian vojon. Ŝi akceptas la defiojn de la sorto, kiam ŝi sufiĉe akiris fidon je ŝi mem.

Kiel ŝi amas ?

Se per bonŝanco ŝi renkontas ekde la juneco viron indan je ŝia admiro, ŝi iĝos admirinda edzino. Ŝi postulas multon, sed donas tiom.

Foje ŝi adaptiĝas je viro, kiu na konvenas al ŝi, tiam ŝi serĉas en sia propra kariero trovi la kontentiĝon, kiun li ne alportas al ŝi.

Se ŝi estas tro memcentrita, ŝi „kolektos“, „voros“, la amantojn.

verkis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio

Internacia Literatura Esperanta Konkurso

“HRISTO GOROV-HRIMA” – 2020

INTERNACIA LITERATURA ESPERANTA KONKURSO “HRISTO GOROV-HRIMA” – 2020

Hristo Gorov – Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso estos por **rakonto kaj eseo**.

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkitaj en Esperanto. La konkurso ne havas konkretan temon. La verkoj estu

tajpitaj komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu Esperantan alfabeton per supersignoj. La aŭtoroj indiku sian sekson (inan aŭ viran). La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, estu plena poŝtadreso, telefono kaj interretadreso. La rakontoj kaj eseoj estu maksimume 3-paĝaj, formato A4, la literoj estu Times New Roman - 12 punktaj.

La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 30-a de septembro 2020 al adreso: e-mail: modest@abv.bg aŭ per la poŝto al adreso: Georgi Mihalkov, Sofio – 1229, “Vrabnica” 1, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario



DUA PARTO - LA VIVO

72



Se la homoj ne timas la teruron,
tiukaze venos la granda teruriĝo.
Ne faru malvasta ilian loĝejon
kaj ne mizera ilian vivon.
Ĉar nur per tio, ke ili ne vivas en malvasto,
ilia vivo ne fariĝos mizera.

Tiel agas ankaŭ la saĝulo:
Li ekkonas sin mem, sed ne volas brili.
Li amas sin mem, sed ne serĉas honoron por si mem.
Li forigas la alian kaj prenas ĉi tion.

Rimarkoj de Annespera:

Vilhelmo:

„Ĉar nur per tio, ke ili ne vivas en malvasto,
ilia vivo ne fariĝos mizera.“

La originala teksto tre malfacile kompreneblas. Tial mi ne scias kiu traduko de la du frazoj estas pli fidela al la originalo, ĉu tiu de Vilhelmo, ĉu tiu de Wang

Chongfang?

Vd. de Wang Chongfang:

„Nur ne subpremante la popolon,
Vi povas sentigi al ili nenian subpremon.“

Rimarkoj de Cezar

Tiu ĉapitro estas kvazaŭ la baza fundamento de ĉiu homafabla sociologio.

1. La respondeculoj kaj ni mem traktu la homojn bone, tial ni ne metu ilin en malvastajn kaĝojn kiel bestojn.
2. Se ni ĉiuj tiel agas, la homoj fariĝos ne-mizeruloj kaj ekĝuos la vivon.
3. Ni mem amu nin, sed ne tro kaj ne koste de la aliaj,
4. Ni rezignu pri tro da lukso kaj kontentiĝu prefere pri tio, kion havas ĉiu.

La germana karikaturisto Zille, kiu pentris antaŭ ĉirkaŭ cent jaroj, ofte pentris kaj desegnis bildojn pri la mizero de la proletaro en Berlino, ofte kun nekutime sarkasmaj komentoj, per sprita aforismo tre koncize esprimis la saman kiel Laocio: „Oni povas mortbati homon per loĝejo same tiel bone, kiel per hakilo.“

(daŭrigota)

19>> apotekisto), rilate al bestoj kaj pluraj aliaj. Grete havis konatulan rilaton kun la pentristo Konrad Felix-Müller. Mi posedis artlibron pri li. Unu el liaj pentraĵoj montris Grete-n kiel studentinon. Ŝi alportis valorajn artlibrojn pri naturecaj grafikaĵoj pri floroj kaj insektoj faritaj de Maria Sybille Merian. Ilin mi rajtis pristudi certan tempon, ĝis kiam ŝi hejmenprenis ilin denove. Ŝi donacis al mi de ŝi pentritajn buntajn abstraktajn bildojn. En ŝia maljunaĝo ŝi ne plu kapablis pentri per siaj manoj.

Ŝi trovis maljunulejon, kiu plaĉis al ŝi, en Klein Wanzleben. Ĉe la administrantoj ŝi estis postlasinta leteron kun mia adreso kaj telefonnumero. En kazo de serioza malbonfarto ili kontaktu min. Post tia telefonvoko mi kun taksiaŝofora amiko interkonsentis pri fiksa prezo por la tien- kaj revenveturon. Mi trovis Grete en sia lito, magriĝinta, apenaŭ rekonebla. Ŝi ĝojis, ke mi estis tuj veninta. Ŝi suferis je intesta kancero, la fino alproksimiĝis. Solidarece mi tenis ŝian

manon, laŭ ŝia deziro mi plurfoje donis al ŝi sukron por trinki. Ŝi petis pli da aero. Plurfoje mi malfermis kaj refermis la fenestron. La flegistaro aprezis, ke mi estis veninta. Oni ofertis al mi vespermanĝon kaj por unu nokto senpagan tranoktadon en la gastoĉambro. Ekde frua mateno mi denove sidis apud la lito de Grete. Tion al-menaŭ mi povis fari por ŝi. Min doloris vidi ŝin tiom suferi. Plurfoje ŝi diris al mi, ke ŝi heredigos sian korpon al la scienco. Posttagmeze la taksiaŝoforo prenis min hejmen kiel interkonsentite. Pezkore mi adiaŭis Grete-n. Alveninte hejmen, mi ricevis telefonvokon kun la sciigo, ke s-ino Grete Berger-Falk kviete endormiĝis, ke ŝi estis ĝojinta, ke mi estis tuj veninta, ke tio estis grava por ŝi kaj mi. Krom mi ŝi havis nenian proksiman rilaton. Malgranda konsolo por mi, ke mi estis apud ŝi dum ŝia vivofino kaj tiel povis fari ion por ŝi.

sendis Helga Plötnner portretistino el Germanio

32>> hejmen, sed ĉe la tombeja pordego ĝin formetis, por ke li ripozu, sed elĉerpita de ĝia pezo, de laceco, sed plej multe de biero, li endormiĝis sur la mola deklivo.


Pri tiu ĉi historieto la homoj ridis ankoraŭ longe post kiam ĝi okazis. La muzikanto plendis kontraŭ Domáň pri tio, ke li pafdetrus lian kontrabason kaj la

posedanto de la ĉasejo denunciis la pafanton pri tio, ke li en lia ĉasdistrikto ĉasas ursojn.

Fonto: **Legolibreto 2** de Jindřiška Drahotova



*Grete Berger-Falk,
nigra kreto
1984, 30 cm x 40 cm*



plenumis: Vulpon! Erinacon! Serponton! Katojn! Hundon! ktp. La tabulo estis plenkovrita per bestbildoj. Kia bedaŭro, kiam ni fine devis ĉion forviŝi. Sed estis kurso de la distrikta altlernejo Wittenberg en Gräfenhainichen, kaj kiel docento mi devis atenti postlasi la klasĉambbron pura.

Grete veturis en blua Trabant - kombiaŭto. Per ĝi ŝi venis el Schönebeck. Kiam ŝi estis forveturinta, mi sur la kuireja tablo sub la ruĝ-blanka tablotuko trovis 100-markan monbileton. Ĝin ŝi estis metinta tien sekrete. Ŝi ne volis havi dankon! Sed en mia koro mi sentis grandan dankemon. Dum ŝia sekvanta vizito mi dankis. Tiutempe mi estis sufiĉe malriĉa pentristino. Mi vivtenis min per portretmendoj kaj la honorario por miaj pentrokursoj. Mi loĝis en misera, malkonstruota domo. Mi trovis alian malnovan domon kun apuddomo, kiu havis du montrofenestrojn kaj kiu estis uzebla kiel ateliero. Al la tereno meze en la urbo apartenis korto kun malnovaj staloj kaj ĝardeno, ĉe la strato vidalvide de la urbodomo kaj la urba fairplaco. La domo kun la tereno tiutempe kostis 10.000 GDR-markojn. 4.000 mi estis pene ŝparinta pere de mia pentrado. Grete prijuĝis la domon, martelante la murojn per marteletoj. Ŝi donis al mi surmane 6.000 markojn. Dokumenton ŝi rifuzis akcepti. Ŝi volis absolute nenian rekompencan. Ŝi ankaŭ ne volis en sia maljunaĝo esti flegita de mi. Se necesos, ŝi planis iri en elektitan maljunulejon. Ŝi diris al mi: "Helga! Vi estas tiom granda talento, al vi oni devas doni helpon!" Mi aĉetis la domon kontante sen devi fari ŝuldojn. Ĝis kiam s-ino Friebe, kiu vendis la domon al mi, estus ricevinta loĝejon, mi jam povis uzi la apuddomon kaj la malantaŭajn ĉambrojn por mia laboro. Grete ofte vizitis min. En ŝia "Trabbi" aŭto ŝi transportis al mi malnovajn meblojn el ŝia granda loĝejo super la apoteko. Malgrandan rondan tablon kun marmora plato, fajne lignoskulptitan apudtablon, stativon de starlampo. La mankantan ŝirmilon mi ricevis ĉe la lampovendejo Buchin.

Post nia finstudado en 1978, ni en la seminariejo Saalehütte en la urbo Bernburg daŭre havis ĉiujare laborsemajnojn, liberaeran pentradon kaj pluedukadon pri diversaj temoj kaj artaj teknikoj.

Tie vizitis nin s-ino Grete Berger, kiu interesiĝis pri arto. Mi petis ŝin pozi por mi. Ni rigardis unu la alian profunde en la okulojn kaj tuj bone interkompreniĝis. Ŝi diris al mi: "Etulino, mi vin adoptos!" "Sed mi ja jam havas gepatrojn.", mi respondis. Ŝi ne havis infanojn. Ŝi estis sola post la morto de siaj patrino kaj edzo. Dum la desegnado min interesis ŝiaj saĝaj okuloj kaj ŝia buŝo, kiu montris saĝan rideton. Dum mia respektoplena portretado ŝi al mi pli kaj pli familiariĝis. De la rezulto ŝi videble estis impresita. Sekrete, por ke miaj kolegoj ne vidu, ŝi enmanigis al mi 50 markojn. Kiam mi volis doni la portreton al ŝi, ŝi rifuzis: Ne, mi petas, ke vi retenu ĝin. Mi havas neniun. Ĉe vi ĝi estos pli bone priatentata." Tiel komenciĝis nia amikeco. Mi donis al ŝi mian adreson. Ŝi ofte vizitis min. Grete interesiĝis pri mia vivo kaj mia pentrista laboro. Kelkfoje ŝi donis utilajn konsilojn, kiam mi laboris pri iuj taskoj. Ŝi mem kapablis pentri kaj desegni, ŝi montris al mi plastikecan, esprimriĉan kapon de kuracista amiko. Ŝi donacis al mi viran muskolfiguron el gipso. Ŝi menciis, ke tiu valora modelfiguro venis el Parizo. Sian vivon ŝi estis prezentinta kvazaŭ biografion pere de figuraj desegnaĵoj. Ilin mi rigardis kun granda admiro. Ŝi el sia memoro trafe desegnis homojn kaj bestojn de ĉiuj flankoj. Tiajn temojn mi ne povis desegni libere nur laŭ la memoro. Mi nur desegnis vidante la modelon aŭ foton. Foje mi kunprenis Grete-n posttagmeze en lernejon al mia pentrokurso por infanoj. Ŝi demandis, kiujn bestojn ŝi desegnu sur la grandan tabulon. La unua deziro estis ĉevalo, tuj ŝi desegnis ĉevalon de la flanko, de antaŭe, eĉ de malantaŭe, kaj tiom bone, ke estis ĝuo sekvi ŝian laboron. Pliajn dezirojn ŝi volonte

dismetitan en siajn elementojn ŝi alportis al mi verdan, ornamitan vestoŝrankon el ĉerizuja ligno. Pro tiu ŝranko jam multaj homoj enviis min. Ili havis okulojn nur por la ŝranko kaj ne mia bildoekspozicio en la koridoro. Kompreneble tio tristigis min. Grete multe helpis al mi. Sed dum ŝiaj vizitoj mi dum horoj devis aŭskulti, kiam ŝi rakontis pri sia vivo, ofte la samon plurfoje. Ĉiam mi afable aŭskultis. Grete bezonis min kiel mi ŝin, komprenemaj kaj dankemaj amikinoj ni estis. Mi admiris ŝian profundan scion sur la kampoj de arto kaj medicino (ŝia edzo estis estinta >>18

Ŝercoj



Du bovinoj interparolas:

- Imagu, mi havos bovidon.
- Kiu estas ĝia patro.

- Kiel mi povus scii? Mi neniam rigardas malantaŭen. Ĉu vi pensis ke mi estas rigardulo/vidmaniulo?

NENIAM ESTAS TRO MALFRUE

Flegistino petas malsanulon:

Bonvolu ellitiĝi kaj fari dekon da saltetoj.

- Kial?

- Ĉar mi forgesis skui la medicinaĵon antaŭ la uzo.

Kelkaj homoj nin demandas pri la sekreto de nia longa geedzeco.

Ni ĉiam rezervas tempon por iri al

restoracio du fojojn semajne. Lumo de kandeloj, vespermanĝo, agrabla muziko, danco... Ŝi iras jaŭde kaj mi vendrede.

de Henny Youngman

**Bordelo la eduksistemo, bordelo la sansistemo, bordelo la socio.
Mi scivolas, kial kun tiom da bordeloj la ŝtato ne profitas!**





Krucvortenigmo

HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Simbolo por berilio je kemio; 3. Konsonantoj de ŝipo; 5. ___ ŝafoj, estos lano (Zamenhof); 7. Longe kuiri; 8. Surfacon generitan de cirklo; 9. Ludkartojn kun unu sola punkto.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Rilata al animalo; 2. Estas ŝafoj, ___ lano (Zamenhof); 3. Estas ___, estos lano; 4. La 23a grafemo de la greka alfabeto; 6. Ŝakfiguro kiu moviĝas laŭ vertikaloj aŭ horizontaloj.



HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Monda, sekulara; 6. Ilo el oro ___ por ĉiu laboro (Zamenhof); 7. Riboj sen ekstremaĵoj; 8. ___ en paco; 9. Ilo el oro taŭgas ___ ĉiu laboro; 11. Unua duono de Ezra; 12. Mallarĝa areo ĉirkaŭ punkto aŭ centro; 14. Preskribo aŭ regulo.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Ilo el oro taŭgas por ĉiu ___; 2. Jes ___ ne?; 3. Kaŭzi, fari; 4. Persono el Karelio; 5. Urbo en la itala regiono Umbrio; 6. Modelan, karakterizan; 10. Mallongigo de Reto Ekspresa Regiona de Francilio; 13. Landokodo de Omano.

Fonto: **Semajno de Enigmoj #6**

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo troviĝas en la antaŭlasta paĝo)


La malta insularo fieras pri siaj historiaj monumentoj samkiel Egiptio fieras pri siaj piramidoj kaj kiel Anglio sin gloras pri siaj Avebury kaj Stonehenge.



Pratempaj ŝtonegoj

Ĝis antaŭ kelkaj jaroj oni pensis, ke la egiptiaj piramidoj estas la plej antikvaj, arkitekturaj monumentoj en la mondo. Tamen laŭ la plej lastatempaj arkeologiaj studoj, la plej fruaj maltaĵaj arkeologiaj temploj estas ĉ. 1,000 jarojn pli aĝaj ol la piramidoj de Giza.

Dise tra la malta insularo troviĝas ĉirkaŭ 30 de tiuj unikaj megalitaj ² pratemploj. La plej admirindaj estas la "Ĝgantija" ³ en la apuda insulo Gozo, kaj la triopo: "Haĝar Qim" ⁴, "Mnajdra" kaj "Tarxien" ⁵ en Malto. Ĉi tiuj temploj estas preskaŭ ĉiuj samtipaj kvankam konstruitaj en diversaj periodoj.




Unu el la pratemploj

Laŭ arkeologiaj restaĵoj, la unuaj loĝantoj de Malto alvenis ĉ. 5000 a. K. Ili uzis argilajn ilojn. Tio indikas, ke ilia specio jam malaperis dum la neolitika fazo, t.e. dum la dua fazo de la prahistorio. Nu ĉi tiu neolitika fazo en la malta arto estas tiel signifoplena, ke la itala arkeologo Ugolini (1895-1936) deklaris: "Se ne ŝajnus paradokso, mi dirus, ke la malta neolitika epoko... povus esti rigardata, kiel la klasika periodo de la plej frua arkeologio."



Maltaj pratempaj reliefaĵoj

Oni povas ankaŭ aserti, ke ĉ. 3200 a.K. alvenis malton alia popolo, malsama al la antaŭa. Estas pro tio, ke la fama angla arkeologo Davis H. Trump (1931-2016) apartigis la tri fazojn de la neolitiko ekde la aliaj sekvaj, apartenantaj al la "Kupra" fazo. La neolitikuloj uzis ŝtonon kiel laborilon kaj armilon, dum kupruoj uzis la unuan metalon, kupron, kio montras pli altan ŝtupon en la arkeologia arto. Asertebblas alia fakto: en ĉ. 2800 a.K., ĉi tiuj koloniistoj postlasis tute sendepandan kaj unikan civilizacion, kies unika manifestaciaĵo estas la fame konataj pratemploj. Aldone, kelkajn vortojn pri la "Hipogeo", subtere elhakita pratemplo, kies eltrovintoj estis arkeologoj D-ro Temi Zammit (1864-1935) kaj Patro Manwel Magri, jezuito (1851-1907). Oni ĉi tie trovis ostojn de pli ol 7,000 homoj, spurojn de mistera popolo.



Hipogeo

Laŭ la arkeologo, Profesoro Temi Zammit, ĉi tiuj monumentoj estas "la rezulto de primitiv-kultura rafineco disvolviĝanta dum jarcentoj da klopodado."



Neolitikaj ornamaĵoj

¹ El "La Maltaj Megalitaj Pratemploj", Carmel Mallia, 2011.

² El la greka 'mega' (granda) kaj 'litos' (ŝtono); do konstruitaj per grandaj ŝtonblokoj.

³ = gigantaĵo; G pron.: ĝ.

⁴ Starantaj ŝtonoj.

⁵ Pr: Tarŝin

verkis kaj sendis Carmel Mallia el Malto



Leciono de ĉiutaga vivo

- En ĝangalo:
- Elefanto estas la plej granda;
- Ĝirafo estas la plej alta;
- Vulpo estas la plej saĝa;
- Gepardo estas la plej rapida.

Tamen,

Leono estas reĝo de la ĝangalo eĉ sen ĉiuj kvalitoj menciitaj pli ĉi- supre.

Kial? ĉar:

verkis kaj sendis Honoré Sebuhero el DR Kongo

- Leono estas kuraĝa, aŭdaca, marŝante kun konfido, kuraĝas, aŭdacas ĉion kaj neniam timas.

- Leono kredas, ke ĝi ne povas esti haltigita.

- Leono prenas riskojn.

- Leono kredas, ke ajna besto

estas nutraĵo por si.

- Leono pensas, ke ĉiu oportuneco meritas esti konsiderita kaj neniam lasas eskapi ion el siaj manoj.



Tiam ...

- Vi ne bezonas esti la plej rapida.
- Vi ne bezonas esti la plej saĝa.
- Vi ne bezonas esti la plej inteligenta.
- Vi ne bezonas esti la plej brilanta.
- Ĉio, kion vi bezonas estas kuraĝo.
- Ĉio, kion vi bezonas estas la volo por provi.
- Ĉio, kion vi bezonas estas la fido kredante, ke

tio eblas.

- Ĉio, kion vi bezonas estas kredi en vi mem, ke vi povas fari ĝin !!

- Leonoj neniam marŝas solaj!


Leono estas la sola granda besto kiu vivas, ĉasadas kaj manĝas grupe.

Ĉi tiu kvalito montras kion ni ĉiuj bezonas unu la alian por sukcesi, ĉu en familio, kvartalo, laborejo, preĝejo kaj la popolo ĝenerale!

Moralo:

Ne marŝu, laboru kaj kontrolu teamon por la vivo kaj pli bona estonteco.

verkis kaj sendis **Honoré Sebuhero** el DR Kongo



Poeziaĵoj de Ilir Zhiti

tradukis kaj sendis Bardhyl Selimi el Albanio

Portreto de la patrino

Ekstere jam neĝis

Mateno viglas nur hodiaŭ.

Mi frontas al korŝira portreto de patrino

Mentone min apogas sur la manplato.

Per tristaj okuloj ŝi alrigardas min komplete

Ho kion ajn mi fordonus

Por ke mi vidu tiun karecan geston

Ke ĝi okazu realece..

Tirana, 1-an de marto 2018

Kial mi estis tristita, tion ne scias

Kial ĉimatene mi estas tristita, tion ne scias

Kiel ĉiutage burĝoniĝon de floroj mi rigardas

Kio kvazaŭ per magia animo en la vazoj okazas

tie sur la fenestra kornico de la ĉambro

tie en Tirana, en mia propra domo

sed mi fakte dolorige konsciiĝas


ke la malfermitaj floroj ne estas

ĝuste samaj al tiuj

kiujn mi florigante vidis

jam en pli fruaj tagoj.

Tirana, 09.04.2016



La Trojanoj (Τρώες)

tradukis kaj sendis Roland Platteau el Francio



"Τρώες", poemo de greka poeto Konstantinos Kavafis el Aleksandrio, Egiptio (1863 – 1933)

Malfeliĉaj ni estas ! Niaj klopodoj similas la vanajn elsturmojn de la Trojanoj. Ni gajnas iom. Ni rekonfidiĝas iom.

Kuraĝo kaj belaj esperoj ree venas en nin.

Sed ĉiufoje neantaŭvidita fakto okazas, kaj haltigas nin: Aĥilo ekvidiĝas sur rando de la fosajoj, kaj nin terurigas per siaj laŭtaj krioj.

Niaj klopodoj similas tiujn de la Trojanoj: Kredas

ni fordirekti batojn de l'sorto per la peno de nia decidemo kaj kuraĝo. Kaj ni staradas ekster la muroj, batalpretaj.

Sed ĉe la decidiga momento, nia kuraĝo kaj decidemo mortas. Nia animo konsterniĝas, malaplombiĝas kaj ni turnante ĉirkaŭ la muregoj serĉas savi nin per fuĝo.

Pereo nia tamen nepras. Sur remparoj jam veadoj sonoras. Niaj memoroj kaj pasintaj emocioj ekfunebrias. Funebre Hekubo kaj Priamo veploras por ni.

tradukis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio



La legendo de Rozafa



(kastelo de Shkoder, norda Albanio)

Tri fratoj laboradis je konstruo de kastelo, sed ili malĝojegis kaj ne sciis pri rimedo, ĉar cxiam taglaboro dum nokto ruiniĝis kaj daŭris ja simile post ĉiu taga tedo.

Triope la konstruistoj ekserĉis saĝulon, trovinte

lin demandis kaj aŭskultis atente: "Se vi vere volas kastelon finkonstrui, virinon enmurigu, kvankam ja lamente."

Tiel diris la saĝulo kaj foren malrapidis, sed doloris fratoj pro decido devigita kaj ĵuris en vespero: l' edzino, kiu portos la panon frumatene -ŝi estu oferita.

La du pli aĝaj fratoj la ĵuron fie rompjis, al siaj novedzinoj malkaŝis la decidon.

Kaj tiel la edzino de la plej juna akceptis la sinoferon kaj montris tiel sian fidon.

Danke al Rozafa staras daŭre la kastelo, kaj daŭris dum pasos jarcentoj en lontano.

Ni vin memoros, Rozafa, kaj vian sinoferon, ne nur tiel Shkoder, sed kiu ajn albanio.

Tradukis kaj sendis **Bardhyl Selimi** el Albanio




La beleco estas tragika

librorecenzo

Julian Modest: Ĉasisto de sonĝoj
Eldonejo Libera, 2019

J.M. – Nula dies sine linea



Mi ĵus finlegis la novan novelaron de Julian Modest alloge titolitan "Ĉasisto de sonĝoj". Kiel kutime okazas ĉe mi, mi vere ĝuis legante malrapide, kvankam ne nur la ĝuo estas kialo de mia malrapideco, sed ankaŭ troeco da tempo pasigita ĉe la komputilo pro la virtuala instruado de

miaj gelemantoj ĉar ni ĉiuj vivis fermitaj hejme pro la koronaviruso. Intertempe min ne atingis la papera eldono de la libro, kiun mi legus komforte en mia lito, kiel mi plej multe ŝatas fari. Inter duonhoro kaj unu aŭ du horoj antaŭ la dormo, por mi estas la plej bona tempo por legado – legado dum kiu oni forgesas la tagajn problemojn kaj tedaĵojn, kaj okupiĝas pri alies vivoj kaj ideoj, kiujn peras la literaturarto. Mi esperas ke vi bone komprenas pri kio mi parolas!

Mi finlegis kaj aliris la komputilon por verki recenzan eseon pri la libro ne volante prokrasti la aferon. Ekzemplo, kiun al mi donas la aŭtoro, kiu en la

lastaj jaroj estas ege produktema kaj produktanta, eldoninte ekde 2016 eĉ ok originalajn Esperantajn librojn, estas envianda kaj parolanta pri vera verkista disciplino, kiun oni povas priskribi per la konata latina proverbo "Nula dies sine linea" – neniuj tagoj sen linio. Ne gravas ĉu vi estas profesia verkisto aŭ ne – tio estas profesia labormaniero. Kaj Julian Modest estas profesia Esperanta verkisto laŭ sia laboro, kvankam de tiu laboro, kiel en ĉiu malgranda literaturo, aŭ pli precize literaturo kun malmultaj legantoj, oni ne povas esti profesia verkisto kiu vivas de la verkado. Tia verkisto povas vivi por la verkado, kion mi bone vidas el la modesta ekzemplo de Modest. Tamen, tiu ekzemplo por mi estas nur fonto de bonintenca envio – kaj sciante, ke nur sidante super papero aŭ ĉe komputilo kaj vicigante vortojn kaj ordigante frazojn oni povas verki ion, nun mi faras la samon. Sed post ĉi tiu teksto pasos verŝajne unu monato aŭ eĉ pli ĝis iu nova teksto. Aŭ povas okazi, ke en la sama monato mi verkos eĉ kelkajn tekstojn. Povas okazi, mi skribis, sed al Julian Modest tio ne povas okazi – li verkas verŝajne ĉiutage, ĉar mi trovis lian frazon eleganta, glata, preciza; trejnita de ĉiutaga verkado. Ja mi ege ĝuis tiun glatecon, tiun novelistan stilon, kiu per unu malgranda ĉapitro, per nur kelkaj frazoj skizas scenografion de loko kie okazas evento, per alia ĉapitro konatigas nin kun sia "heroo" kaj jam en la tria ĉapitro ni legas la temon kaj intrigon de la novelo.

Rolo de la priskriboj

Antaŭ du jaroj mi jam skribis pri la novelarto de Julian Modest (pseŭdonimo de Georgi Mihalkov, naskita en 1952 en Sofio, Bulgario) recenzante lian novelaron "Dancanta kun ŝarkoj" kaj nenio ŝanĝiĝis en lia verkista kapablo. Tamen, mi devas diri ion novan, ĉar temas pri nova libro, kaj ne estus interese denove paroli pri samaj ecoj de lia arto. Tio, kion mi devas denove akcenti, estas neebleco priskribi simple la novelaron, enhavantan 26 novelojn. Multe pli simple estas paroli pri romano, eĉ se ĝia strukturo estas komplika. Tial mi koncentriĝos nur al iuj elementoj de la novelaro kaj nur al iuj noveloj. Unue mi ankoraŭ iom deziras paroli pri la enkondukaj priskriboj kaj ilia ofta lirikeco. Jes, eĉ se temas pri noveloj kun ordinaraj, ĉiutagaj okazaĵoj, Modest ŝatas en kelkaj frazoj havigi al la leganto scenografion de jarsezono kaj loko kie okazos la evento. Tiel la unua novelo, "Fideleco", komenciĝas preskaŭ romantike: "La parko dormis sub la mola neĝa kovrilo. La aleoj silentis senhomaj. La arbobranĉoj neĝarĝentis kaj la glaciaj kristaletoj sur ili respugulis la matenan sunlumon. Aŭdiĝis nur ies grincantaj paŝoj sur la neĝkovrita pado. Onklino Neda kaj ŝia hundo Rad promenis. Ili paŝis malrapide unu apud la alia en ankoraŭ dormanta parko." Tia komenco kaj la titolo iamaniere precizigas la temon – fidelan amon de la hundo al sia mastrino. Kaj jes, tio estas la temo, sed se vi tralegos la novelon, vi vidos ke ĝi verdire estas pli realisma ol romantika. Iamaniere la priskriboj estas tio, kion vidas la personoj, ekzemple en "La nova lernejo" la printempon el al unua alineo rigardis Kalojan, kiu "ŝoforis malrapide al urbo Burgo", "en la suna aprila mateno" en la komenca frazo de la dua alineo. Li vidis jenon: "La ŝoseo similis al arĝenta rubando, rekta kaj glata. Je ĝiaj du flankoj estis verdaj kampoj kaj ie-tie videblis florantaj arboj kiel fianĉinoj en blankaj roboj. La printempo kiel nevidebla mirakla birdo etendis vastajn flugilojn kaj la naturo vekiĝis por nova vivo." Plej ofte tiuj priskriboj ne estas nura fono, io lirika, poeta en nia aŭtoro, kio tamen videblas en ili. Nome, ŝajnas ke li iamaniere, kiel aŭtoroj de la romantikismo, kredas je ligitecon inter homo kaj naturo. Tiel en la novelo "La violonisto", aŭtuna enscenigo kun iom pli da frazoj ol cetere, inter kiuj elstaras bildo de kaŝtandarabaj branĉoj, kiuj "similas al brakoj, etenditaj pete al la ĉielo", estas vere metaforo por sentoj de Slava, kies filino Elka "loĝas malproksime, trans maroj kaj oceanoj", kaj Slava vivas solace ĉar "La homoj, kiujn ŝi amis forpasis unu post la alia. Ili, kiel la arbofolioj, forflugis ien, pelitaj de frosta vento." Ankoraŭ pli gravas priskribo komence de "La blanka koŝmaro": "En la hospitala ĉambro ĉio estis blanka: la

muroj, la plafono, la lito, la littukoj, la kuseno, la lampo... La blanka koloro turmentis Marian. Ŝajne ŝi kuŝis sub peza blanka lavango kaj ne povis spiri. Maria fermis okulojn, sed daŭre ŝi vidis blankajn montojn, blankajn riverojn, nubojn, virojn en blankaj kostumoj kaj virinojn en blankaj roboj. Neniam antaŭe Maria opiniis, ke la blanka koloro estas tiel turmenta. Laŭ ŝi la nigra koloro estis inkuba: la koloro de la morto, de la malsanoj, de la tristo, de la senespero, de la suferoj... Tial Maria ne kutimis aĉeti nigrakolorajn vestojn. Ŝi ne ŝatis la mallumon kaj la obskuron." El tiu turmenta troo de blankeco ŝin savas kontakto kun juna flegistino, kiu iom poste eniras en ŝian vivon kiel amikino, loĝanta ĉe li kaj lia edzo. Sed kiam post iom da tempo la junulino graveda foriras de ili, post infannaskiĝo mistero de ŝia foriro kaj silento malkaŝiĝas kiel la edza malfideleco kaj al Maria okazas ke "peza lavango kovris ŝin kaj ĉio iĝis koŝmare blanka." Jen kiel la priskriba motivo fariĝas motivo per kiu komenciĝas la novelo, sed kiu same revenas fine kiel iaspeca konkludo de la novelo.

La motivoj kaj ilia prezento

Mi jam diris ke la novelaro enhavas 26 diverstemajn novelojn. Krome, la lerta rakontanto kia Modest estas, ne estas difinita per la elektitaj temoj kaj motivoj; tono kaj gvidado de la rakonto de la komenco ĝis la fino, kun ĉiama klopodo surprizi la leganton, rakonti ion alian ol oni supozas, spekti sian heroon en la momento de gravaj vivospertoj kaj vivoŝanĝoj, vere difinas la majstron. Tiel iu ajn motiva kaj tema grupigo nenion dirus pri la novelaro. Pli gravas vidi kiel la aŭtoro sentas gravecon de iuj ideoj kaj faroj de siaj roluloj kaj en kian atmosferon li metas ilin. Julian Modest ne estas unuflanka, unudimensia aŭtoro; li ne verkas nur realisme aŭ nur romantike, nur fabelmaniere aŭ grize kiel iuj modernaj aŭtoroj ŝatas priskribi grizecon de la vivo. Ja kun tiom da malsamaj enrigardoj en homajn vivojn (jes, literaturaĵoj priskribas homajn vivojn, eĉ kiam ili estas elpensitaĵoj!), la vivo ne povas esti griza – abundeco de homaj kondutoj, deziroj, agoj kaj sortoj pli similas al ĉielarko. Nur tial ankaŭ la literaturo povas esti interesa – se ni ĉiuj estus samaj kaj ĉio en niaj vivoj estus sama – nenio interesa estus por priskribi, rakonti, kaj, fine, legi.

Estas tuta vico da bonegaj noveloj en ĉi tiu novelaro. En "La letero" filino intervenas en la solecan vivon de sia patro vidvo uzante fejsbukon, en "La mantelo" io, kio en la manoj de nespertaj aŭtoroj fariĝus dolĉeta amrakonto, ricevas bonegan turnon, same kiel neatenditaĵoj okazantaj en "Renkontiĝo" inter nekonata patro, kiu pasigis 18 jarojn en malliberejo kaj lia filo kaj en akra fino de la "La nobla

kavaliro”, kies titolo estas vera trompo, havanta nenion kun la situacio de la homo kiu post longa ruiniĝo esperas kaj bildigas al si ian prosperon, kaj lian rideton forviŝas la filina demando: “Paĉjo (...) Kial vi humiliĝas?” Tre plaĉis al mi “La incendio”, “Envio”, belega rememoro pri infanjaroj kaj la patro de la heroino de “La plej bela memoro”, “La enigma silueto”, “La boato”, iom mistera “Sinjoro Dimov kaj la pupo” kaj la fina, tute mallonga, nur iom pli ol unupaĝa “Onklino Dora”, pri Dora, kiu aŭguras el kaforestajtoj. La aŭtoro elektis fini per la espero. Nome, kiam juna virino venis kun buketo da rozoj danki al onklino Dora por bona aŭguro – la edzo revenis – ŝi respondis al la demando de la rakontisto “kiel ŝi antaŭvidis, ke la edzo de la virino revenos”: “Nenion mi antaŭvidis. Mi nur donis al ŝi esperon. Ja ne eblas vivi sen espero.”

Sed mi faros mian finon. Por tio mi elektis tri novelojn. Unue iom da saĝeco el “La monaĥejo Sankta Ilija”. Tie sukcesa entreprenisto preskaŭ pereis en la montara arbaro pro subita ŝtormo. Veninte en monaĥejon, feliĉa ĉar li saviĝis, li deziras donaci ion al la monaĥoj kiuj tie vivas mizere, sen kurento ... Sed la monaĥo kun kiu li parolis diris ke ili bezonas nenion, ĉar “ni ĉiuj estas provizore sur Tero”. Interese ke ĉio okazas ie ĉe Verdograd – kombino de Esperanta vorto verde kaj slava vorto grad, kiu signifas urbon. Tiuj, kiuj jam legis la verkojn de Modest, povis rimarki ke li ŝatas iomete ludi kun Esperantigo de iuj nomoj kaj klopodas enmeti iujn spertojn de Esperanta movadano en siajn verkojn. Tial ekzistas Ora valo, kaj la titolnovelo “Ĉasisto de sonĝoj” komenciĝas jene: “Neniam mi forgesos la ĉasiston de sonĝoj. Li estis alta, maldika kun blanka hararo longa ĝis la ŝultroj, krispa kiel maraj ondoj. La ĉasisto de sonĝoj venis en nian urbeton ĉiujare la 26-an de julio. Mi bone memoras la daton, ĉar la 26-an de julio aperis la lernolibro de doktoro Esperanto. Ĉiujare la 26-an de julio en nia urbeton, sur la ĉefa placo, proksime al preĝejo, estas granda bazono.” Videblas ke la rakontanto en ĉi novelo estas ne nur esperantisto, sed ĝisostulo, al kiu apero de la Zamenhofa unua lernolibro estas festotago, laŭ kiu li mezuras sian memoron pri la ĉasisto de sonĝoj. Kaj krome, rakontante realece aŭ romantike, tragike aŭ kun espero, li parolas pri rakontado kiel pri miraklo kaj diras: “Ja, en la vivo nepre devas esti iu, kiu montros al ni la vojon al la revoj.”

Ege impresis min la novelo “La lupino”. Ĝi estas tre neordinara, ĉar en la fokuso de la intereso de Julian Modest troviĝas homoj kaj iliaj destinoj, ilia psikologio. En ĉi tiu novelo, kun karakterizoj de fabelo kaj fabelo, ni eniras la pensojn de la lupino – patrino. La komenca sceno diferencas de la plejparto de la

aliaj noveloj. Nur unu vorto por priskribi la jarsezonojn kaj la ĉirkaŭon, kaj poste ni eniras “in medias res” – en la centron de la problemo: “Neĝis. En la truo la lupetoj plorĝemis malsataj. Kelkajn tagojn jam ili manĝis nenion. (...) Dum tiu ĉi vintro estis danĝere serĉi nutraĵon, sed la turmenta plorĝemo de la lupetoj boris truon en la brusto de la lupino.” Jes, tio estas rakonto pri la lupino-patrino kiu devas trovi nutraĵon por siaj lupidoj, sed la plejgrandan parton de la novelo okupas priskribo de ŝia amindumado kaj de la batalo de la plej gravaj, la plej fortaj maskloj ĉirkaŭ ŝi. En tiuj partoj Julian Modest vere malbremsis sian bezonon por vortpentriloj sentoj kaj okazaĵoj. Jes, naturajn sentojn de la pasio kiu movigas ĉiujn rolantojn, pasio kiu estas instinkto por vivi, sed ankaŭ gvidas al la morto. Okazas ina ludo kun aro de la lupoj: “Per siaj akraj verdaj pupiloj la lupoj tiel rigardis ĝin, kvazaŭ en la lupaj korpoj brulis fajro. Tamen la rigardoj de la lupoj ne estis kruelaj. En iliaj okuloj videblis ia brilo, io simila al soifo aŭ al preteco fari ĉion por la lupino, sed la lupino estis ruza. Ĝi ŝajnis, ke ne komprenas la deziron de la lupoj. La sama fajro bruligis ĝian korpon. La lupino allogis movis sian voston, ĝiaj verdaj okuloj estis kiel dolĉa veneno. La lupino rigardis aŭ tiun, aŭ alian lupon kaj iliaj koroj plenplenis pro deziro kaj dolĉa doloro.” Sed same ŝi estis parto de tiu ludo kaj ĉio transformiĝis en veran, kruelan, ĝismortan batalon: “En tiu ĉi momento ĉiuj lupoj saltis unu kontraŭ alia kiel frenezaj kaj komenciĝis kruela batalo. Ululoj, hurloj, muĝadoj vekis la dormantan arbaron. Nur la frida luno estis la sola muta atestanto de la batalo. Grincis dentoj, disŝiriĝis feloj, varmaj sangaj gutoj surŝprucis la herbon kaj la foliojn. La lupino neniam ĝis nun vidis tian kruelan sangavidan batalon. En ĝia koro brulis fajro. La lupino konsciis, ke la batalo estas pri ĝi. La plej forta lupo, la venkinto obsedus ĝin.” Nur post tiu lupina memoro pri pasintaj okazaĵoj, vere ekscitaj kaj streĉaj, ni revenas en la nuntempon – kie al la morto de malpli forta lupo dum la batalo por la amo, aldoniĝas la morto de la lupino. Jen du plej gravaj temoj de la arto – la amo kaj la morto. Kaj ĉio tio kun vera konvinkoforto, vera forto impresi la leganton. Kaj se ni al tiu vera dramo en la naturo aldonas multajn aliajn novelojn, videblas ke la vivo havas siajn belajn kaj malbelajn momentojn, ke ĝi enhavas amon kaj feliĉon, sad ankaŭ malĝojojn, perdojn kaj tragikon. Kaj, nekredible, kvankam ni ĉiuj instigas la feliĉan finon, ni devas, ankoraŭfoje, gviditaj de nia artisto Julian Modest, konfesi ke pli belas tragika fino - ke la beleco estas tragika.

Zdravko Seleš, 2020

Lingve kontrolis Josip Pleadin

Tuta somero dum unu tago



Scienfika rakonto de Ray Bradbury (1954)

En ĉi tiu jaro tri gravaj scienfikciaj aŭtoroj centjariĝas: Frank Herbert, Isaac Asimov kaj Ray Bradbury. Pri tiuj verkistoj kaj pri scienfikcia literaturo en Esperanto vi povas trovi bonan artikolon de Anina Stecay en la julia kluba revueto „Esperanto-Infomilo“ de la Esperanto-Societo Frankfurt. <https://esperanto-frankfurt.de/> Jen mallonga (netipa) SF-rakonto de Ray Bradbury, kiu aperis tie kaj kiun mi ofertas al la legantoj de Turka Stelo.

"Ĉu preta?"

"Preta."

"Ĉu nun?"

"Tre baldaŭ."

"Ĉu la sciencistoj certas pri tio? Ĉu ĝi okazos hodiaŭ, ĉu vere?"

"Rigardu; vidu mem!"

La infanoj premis sin unu al la alia, kiel multaj rozoj, multaj trudherboj, intermiksitaj, kaj elrigardis por vidi la kaŝitan sunon.

Pluvis.

Pluvis jam dum sep jaroj; sekvis miloj post miloj da tagoj, tute plenumitaj per pluvo, per la tamburado kaj torento de akvo, per milda, kristala falo de pluvoverŝoj kaj la skuado de ŝtormoj, tiel fortaj kiel tajdaj ondegaj, kiuj inundas insulojn. Mil arbaroj detruigis sub la pluvo, poste rekreskis por esti detruataj denove. Kaj tiel la vivo estis kaj estos por ĉiam sur la planedo Venuso, kaj tio estis la klasĉambro de la infanoj de la rakedo-homoj, kiuj alvenis en pluvoplena mondo por starigi civilizacion kaj vivadi tie.

"Ĉesas, ĉesas!"

"Jes, jes!"

Margot staris aparte de ili, de tiuj infanoj, kiuj neniam povis memori tempon, kiam ne pluvis kaj pluvis. Ili ĉiuj estis naŭ-jaraĝaj, kaj se iam estis tago, antaŭ sep jaroj, kiam la suno aperis dum unu horo kaj montris sian vizaĝon al la fascinita mondo, ili ne povis memori tion. Kelkfoje, dumnokte, ŝi aŭdis ilin malkviete moviĝi, rememorante, kaj ŝi sciis, ke ili sonĝis pri oro aŭ flava krajono aŭ monero, sufiĉe granda por aĉeti la tutan mondon. Ŝi sciis, ke ili kredis memori varmecon, kiel ruĝiĝo sur la vizaĝo, en la

korpo, sur la brakoj kaj gamboj kaj la tremantaj manoj. Sed ĉiam ili vekigis en tiaj momentoj pro la tamburado, la senfina verŝado de falantaj klaraj kolĉenperloj sur la tegmenton, la trotuaron, la ĝardenojn, la arbarojn – kaj iliaj sonĝoj estis finitaj.

Hieraŭ, la tutan tagon en la klaso ili legis pri la suno. Pri ĝia lemoneca aspekto kaj pri ĝia varmego. Kaj ili skribis etajn rakontojn, eseojn aŭ poemojn pri la suno.

*Mi kredas, ke la sun' estas floro,
kiu floras nur dum horo.*

Tio estis la poemo de Margot, legita per kvietaj voĉo en silenta klasĉambro, kiam ekstere falis la pluvo.

"Ho, vi ne skribis tion!", protestis unu el la knaboj.

"Mi ja skribis tion!", diris Margot. "Mi skribis tion!"

"Vilhelmo!", vokis la instruistino.

Sed tio estis hieraŭ. Nun la pluvo malfortiĝis, kaj la infanoj premis sin al la grandaj, dikaj fenestroj.

"Kie estas la instruistino?"

"Ŝi revenos."

"Ŝi pli bone hastu; ni maltrafos ĝin!"

Ili ĉiuj pelmele babilis kaj instigis unu la alian.

Margot staris sola. Ŝi estis tre fragila knabino, kiu aspektis kvazaŭ kiel perdita en la pluvo dum jaroj kaj kvazaŭ la pluvo forlavis la bluecon de ŝiaj okuloj, la ruĝecon de ŝiaj lipoj kaj la flavecon de ŝiaj haroj. Ŝi estis kiel malnova fotografaĵo en fotoalbumo, kovrita per polvo, paliĝinta, kaj en la maloftaj kazoj, kiam ŝi parolis, ŝia voĉo egalas al tiu de fantomo. Nun ŝi staris, izolita, fiksrigardante la pluvon kaj la laŭtan malsekan mondon trans la granda fenestra vitro.

"Al kio vi rigardas?", demandis Vilhelmo.

Margot nenion diris.

"Respondu, kiam vi estas alparolata." Li puŝetis ŝin. Sed ŝi ne moviĝis.

Ili forŝoviĝis de ŝi; ili ne volis rigardi ŝin. Ŝi sentis, kiel ili foriris de ŝi. Estis tiel, ĉar ŝi ne emis ludi kun ili en la eĥantaj tuneloj de la subtera urbo. Kiam ili tuŝis ŝin por kaptoludi kaj forkuris, ŝi staris kun duonfermitaj okuloj kaj ne sekvis ilin. Se ili en la klaso kantis kantojn pri ĝojo, la vivo kaj ludoj, ŝiaj lipoj apenaŭ

moviĝis. Nur kiam ili kantis pri la suno kaj la somero, ŝiaj lipoj moviĝis, dum ŝi rigardis al la malsekaj fenestroj.

La plej granda krimo estis, kompreneble, ke ŝi alvenis ĉi tien antaŭ nur kvin jaroj de la Tero, kaj ŝi memoris la sunon kaj kiel estis la suno kaj la ĉielo, kiam ŝi estis kvar-jaraĝa en Ohio. Sed ili, ili vivis sur Venuso dum siaj tutaj vivoj, kaj ili aĝis nur du jarojn, kiam la suno elvenis la lastan fojon kaj ili delonge forgesis la koloron kaj varmegon de la suno. Sed Margot ja memoris.

"Ĝi aspektas kiel eta monero", ŝi diris iam, kun fermitaj okuloj.

"Ne, ne estas tiel!", kriis la infanoj.

"Ĝi estas kiel fajro en kameno", ŝi diris.

"Vi mensogas; vi ne povas memori!", kriis la infanoj.

Sed ŝi memoris kaj kviete ŝi staris aparte de ili ĉiuj kaj observis la pluvan krakadon al la fenestroj. Kaj antaŭ unu monato ŝi rifuzis sin duŝi en la lerneja duŝejo, premis la manojn sur siajn orelojn kaj super sian kapon, kriante ke la akvo ne tuŝu ŝian kapon. Do, post tio, malklare ŝi sentis, ke ŝi diferencas de ili, kaj ili sciis pri ŝia malsameco kaj restis for de ŝi.

Onidire ŝiaj gepatroj portos ŝin reen al la Tero venontjare; tio ŝajnis esti gravega afero por ŝi, malgraŭ ke tio signifus grandan perdon de mono por ŝia familio. Pro ĉiuj tiuj kialoj kun grandaj kaj malgrandaj konsekvencoj la infanoj malamamis ŝin. Ili malamamis ŝian palan neĝan vizaĝon, ŝian atendantan silenton, ŝian mincan aspekton, kaj ŝian eblan estontecon.

"Foriru!" La knabo puŝetis ŝin. "Kion vi atendas?"

Tiam, la unuan fojon, ŝi turniĝis kaj rigardis al li. Kaj tio, kion ŝi atendis, videblis en ŝiaj okuloj.

"Ne atendu ĉi tiel!", senbride kriis la knabo. "Vi vidos nenion!"

Ŝiaj lipoj moviĝis.

"Nenion!", li kriis. "Ĉio ĉi estis ŝerco, ĉu ne?" Li turniĝis al la aliaj infanoj.

"Nenio okazos hodiaŭ, ĉu?"

Ili ĉiuj palpebrumis al li kaj poste, komprenante, ridis kaj kapneis.

"Nenio, nenio!"

"Ho, sed...", flustris Margot, kun senhelpaj okuloj. "Sed hodiaŭ estas la tago - la sciencistoj antaŭdiras... - ili diras, ke ili scias, la suno..."

"Ĉio estis ŝerco!", diris la knabo, kaj bruske ŝin kaptis. "He, ĉiuj, ni metu ŝin en kameron antaŭ ol la instruistino venos!"

"Ne!", kriis Margot, retrofalante.

Ili atakis kaj ekkaptis ŝin. Unue ŝi protestis, poste

petis kaj fine ploris; sed ŝi estis ŝovita en tunelon, ĉambron, kameron, kie ili klakfermis la pordon kaj ŝlosis ĝin. Ili rigardis la pordon kaj vidis ĝian ekstremon, ĉar ŝi albatis ĝin kaj ĵetis sin kontraŭ ĝi. Ili aŭdis ŝiajn obtuzajn kriojn. Poste, ridante, ili turniĝis kaj foriris reen tra la tunelo, ĝuste kiam la instruistino alvenis.

"Ĉu vi pretas, infanoj?" Ŝi rigardis sian brakhorloĝon.

"Jes!", respondis ĉiuj.

"Ĉu ni estas kompletaj?" - "Jes!"

La pluvo pli malfortiĝis.

Ili kolektiĝis ĉe la granda pordo.

La pluvo ĉesis.

Estis kvazaŭ en filmo pri lavango, uragano aŭ vulkanerupcio, io malbone funkciis rilate al la sono-aparato, kaj pro tio la sono reduktiĝis ĝis fina halto; sekve ĉiu skualo, resonado kaj tondro ne aŭdeblis, sed fine – kvazaŭ oni elŝiris la filmon el la projekciilo kaj anstataŭis ĝin per alia filmo – fine videblis paca tropika sceno, kiu nek moviĝis, nek tremis.

La mondo venis al halto. La silento estis tiel enorma kaj nekredebla, kvazaŭ oni plenŝtopis siajn orelojn aŭ tute perdis sian aŭdkapablon. La infanoj almetis la manojn al siaj oreloj por pli bone aŭdi. Ili reenpaŝis. La pordo retroenglitis kaj laodoro de silenta, atendanta mondo venis al ili.

La suno sin montris.

Ĝi havis la koloron de flama bronzo kaj estis tre granda. La ĉielo ĉirkaŭ ĝi aspektis kiel akre blua briko. Kaj la ĝangalo ardis pro sunlumo, kiam la infanoj, liberigitaj de la sorĉado, kriante sin ĵetis eksteren, en la printempon.

"Ne foriru tro malproksimen", postvokis la instruisto al ili. "Vi scias, ke vi havas nur du horojn. Vi ne volas esti surprizata de la pluvo, ĉu ne?"

Sed ili kuradis kaj turnis siajn vizaĝojn ĉielen kaj perceptis la sunon sur siaj vangoj kiel varma gladilo; ili formetis la jakojn kaj lasis la sunon bruligi iliajn brakojn.

"Ho, tio estas pli bona ol la artefaritaj sunlampoj, ĉu ne?"

"Pli, pli bona!"

Ili ĉesis kuri kaj staris en la granda ĝangalo, kiu kovris Venuson, kiu kreskis kaj neniam ĉesis kreski, tiel impeta, ke oni povis vidi ĝian kreskadon. Estis plektaĵo el oktopodoj, suprenvolviĝante longajn brakojn el karnecaj trudherboj, ondante, florante dum tiu mallongdaŭra printempo. Tiu ĝangalo, pro la multaj sensunaj jaroj, montris la koloron de kaŭĉuko kaj cindro, kiel ŝtonoj, blanka fromaĝo aŭ inko, kaj ĝi similis al la koloro de la Luno.

La infanoj sin etendis, ridante, sur la ĝangala matraco kaj aŭdis sub si ĝian ĝemon kaj kriĉon, elasta

kaj vivanta. Ili kuris inter la arboj, ili eklitis kaj falis, ili puŝis unu la alian, ili kaŝludis, sed ĉefe ili palpebrumis al la suno ĝis larmoj subenrulis sur iliaj vizaĝoj; kun brakoj etenditaj supren al tiu flaveco kaj miriga blueco, ili enspiris tiun freŝan, freŝan aeron kaj atente aŭskultis la silenton, kiu ĉirkaŭis ilin kiel benita maro de neniŭ sono kaj neniŭ movo. Ili rigardis ĉion kaj ĝuis ĉion. Poste, sovaĝaj kiel bestoj, kiuj fuĝis el siaj kavoj, ili kuris kaj kuris en kiantaj cirkloj. Ili kuradis dum horo kaj ne haltis.

Kaj tiam — meze de la kurado, unu el la knabinoj ekĝemis.

Ĉiu haltis.

La knabino, starante sub libera ĉielo, etendis sian manon.

"Ho, rigardu, rigardu!", ŝi diris, tremante.

Ili malrapide venis al ŝi por rigardi ŝian malfermitan manplaton. En ĝia centro, konvekso kaj granda, troviĝis sola pluvoguto.

Rigardante ĝin, ŝi ekploris.

Kviete ili rigardis ĉielen.

"Ho ve!"

Kelkaj malvarmaj gutoj falis sur iliajn nazojn, vangojn kaj buŝojn. La suno malaperis malantaŭ nebula vualo. Malvarmeta vento blovis ĉirkaŭ ili. Ili turniĝis kaj reiris al la subtera domo, kun malrigide pendantaj manoj kaj malaperantaj ridoj.

Ili ektimis pro tondrobato, kaj kiel folioj antaŭ ol hurikano alvenas, ili ĥaose intermiksiĝis kaj forkuris. Fulmo eklumis dek mejlojn for de ili, kvin mejlojn, unu mejlon, duonmejlon. La ĉielo malheliĝis rapide al meznokto.

Ankoraŭ dum momento ili paŭzis ĉe la enirpordo de la subgrundo ĝis pluvego ekfalas. Tiam ili malfermis la pordon kaj aŭdis la fortegan sonon de la pluvo, amase falanta kiel lavangoj, ĉie kaj por ĉiam.

"Ĉu denove daŭros sep jarojn?"

"Jes. Sep."

Iu el ili ekkrietis.

"Margot!"

"Kio?"

"Ŝi ankoraŭ estas en la kamero, kie ni enŝlosis ŝin."

"Margot."

Kiel palisoj, ramitaj en la grundon, ili staris kaj rigardis unu la alian kaj poste foren, al la mondo, sur kiu pluvis nun, pluvis kaj daŭre pluvis. Ili ne povis vidi la rigardojn de la aliaj. Iliaj vizaĝoj estis seriozaj kaj palaj. Kun klinitaj kapoj ili rigardis al siaj manoj kaj piedoj.

"Margot."

Unu el la knabinoj diris, "Nu...?"

Neniŭ moviĝis.

"Ek", flustris la knabino.

Malrapide ili iris tra la koridoro en la sono de malvarma pluvo. Ŝtormis kaj tondris, kiam ili, kun teruraj, bluj fulmoj sur siaj vizaĝoj, venis al la ĉambro. Malrapide ili alpaŝis la kameron kaj restis staranta ĉe ties pordo.

Malantaŭ la kamera pordo estis nur silento.

Ili malŝlosis la pordon, eĉ pli malrapide, kaj ellasis Margoton.

tradukis kaj sendis **Frank Lappe** el Germanio

Miaj unuaj jaroj de Esperantisteco

(*Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*)

ESPERANTO EN LA JARO 1933

En la jaro 1933 mi ankoraŭ ne lernis Esperanton. Mi eĉ neniam aŭdis aŭ vidis la vorton, nek miaj samfamilianoj nek miaj familieganoj. Tamen en Eŭropo ekzistis miloj da Esperantistoj, sed kiel nun la informantaro neniam menciis Esperanton. En la plej gravaj landoj la Esperantistoj estis dividitaj en almenaŭ du precipaj grupoj, nome la membroj de la neŭtrala U.E.A. kaj la membroj de S.A.T. aŭ de speciale politikaj maldekstraj organizoj. La nombro da Esperantistoj t.n. "laboristaj", maldekstruloj, estis multege pli granda ol la nombro de la neŭtraluloj precipe U.E.A.-anoj. Sed por ili Esperanto estis malpli grava ol iliaj politikaj ideoj kaj movadoj. Internacie ekzistis du gravaj organizoj, U.E.A. kaj la pli granda, laborista, S.A.T., Sennacieca Asocio Tutmonda. Ĉi

verkis Marcel Leereveld el Aŭstralio

lasta enhavis, pro principo, nur individuajn membrojn, ĉiuj voĉdonpovaj dum la jaraj kongresoj. Ĝia nura politika starpunkto estis la kontraŭkapitalismo, kaj la membraro konsistis el ĉiaj specoj de maldekstreco, kiel socialistoj (= socialdemokratoj), stalinistoj, komunistoj, anarĥiistoj, pacifistoj, k.t.p. Kelkajn jarojn antaŭe ĝi havis tre multajn membrojn en la leninisma Rusujo, sed ĉar en la gazetoj de S.A.T. ĉiu rajtis kritiki ĉiun ajn vidpunkton kaj ankaŭ aliajn laboristajn organizojn, la registaro de Rusujo decidis ke rusoj ne rajtas esti membroj de S.A.T., kaj ĝi krome ŝtelis la tutan kapitalon de S.A.T. Plej multaj rusaj Esperantistoj do anstataŭe membriĝis al U.E.A., ĝis Stalin malpermesis ĉiujn Esperantistojn. La plej multaj Esperantistoj estis en Nederlando, sed precipe laboristaj.

En 1933 ankoraŭ ne ekzistis televido: ĝi venis du jarojn antaŭ ol en Aŭstralio. Sed vaste ekzistis la radio-



elsendoj, precipe tra registaraj sendstacioj. La nederlanda registaro posedis du staciojn, kaj dividis la elsendtempon en kvar partojn, unu por la katolikoj, unu por la protestantoj, unu por la laboristoj, kaj unu por la neŭtraluloj. Kutime la homoj aŭskultis nur "siajn" radioprogramojn, kaj ne la aliajn. Mia familio aŭskultis nur la neŭtralajn programojn, sed unu el miaj avoj, kvankam nereligia, iam aŭskultis la katolikan programaron, kaj aŭdis ke tiu katolika stacio intencas dum la jaro elsendi semajnajn lecionojn en Esperanto. Li iĝis tiom favora al lerni Esperanton, ke li vizitis ĉiujn siajn samfamilianojn kaj postvenulojn por devigi ĉiun el ili partopreni en la lecionoj. Fine nur mi kaj mia fratino kaj miaj gepatroj sekvis la kurson kaj do lernis Esperanton. La instruisto de la radiokurso, S.ro Heilker, konsilis ke ni membriĝu al klubo por tie lerni paroli la lingvon, ĉar la radiolecionoj ne povis fari tion. Nur mi membriĝis, kompreneble, al unu el la dek-ok laboristaj kluboj en Amsterdamo. Mi bone sciis ĉiujn vortojn kaj gramatikon de la radio-lecionoj, sed en la kunveno mi ne povis paroli kun la aliaj memroj, kaj do silente aŭskultis la seneraran fluan interdiskutadon de la dudek aŭ tridek aliaj membroj. Kaj tio okazis ne nur je unu kunveno, sed dum la tuta jaro. Mi tamen persistis, kaj mia kapo pleniĝis de la lingvo parolata en la kunvenoj kaj pleniĝis ankaŭ de mia silenta kunparolado en mia menso. Ĝis post mallonga jaro mi subite kuraĝis paroli kun la aliaj, kaj flue, kaj ĉio kion mi aŭdis antaŭe envenis en mian buŝon. Tio pravas, ke oni paroli lernas dum aŭskultado.

Mi membriĝis ankaŭ al S.A.T. kaj en la fino de 1934 decidis partopreni en 1935 en internacia kongreso de tiu asocio. Mi finis la mezan lernejon, kaj kuniĝis al la granda amaso de senlaboruloj, ĉar en tiu tempo preskaŭ neniu junulo povis trovi labordungiĝon. Ankaŭ mia patro estis senlaborulo (virinoj en tiu tempo ne kutimis labori eksterdome). Sen mono mi do devis bicikli el de Amsterdamo al Parizo, kaj tie loĝi en tendo. Mi konis aŭstran Esperantiston el Vieno, kaj ni decidis kune kaj bicikle fari la vojaĝon de Amsterdamo rekte al Parizo kaj retroiri tra Germanujo al Nederlando. Dum la noktoj ni intencis loĝi senpage ĉe farmistoj. La unua nokto estis en norda Belgujo ĉe farmo; ni devis dormi sur la pajlo malantaŭ kelkaj ĉevaloj. La ĉevaloj dum la nokto daŭre huffrapis en nian direkton, tiel ke mi ne kapablis dormi multe. Tamen la ĉevaloj ne povis atingi nin, kompreneble.

La duan tagon ni alvenis posttagmeze en Parizo, kaj mia vojaĝamiko, pli maljuna ol mi kaj kutimiĝinta trinki vinon en Vieno, proponis kune aĉeti botelon de franca vino, tiam kostanta tie nur kelkajn dolarojn. Do li trinkis la unuan duonon de la botelo kaj mi la duan duonon. Post tio li iris al sia tendejo, kaj mi iris al unu

el miaj onkloj kiu loĝis en Parizo kun araba edzo kaj du infanoj. Mi antaŭe estis promesinta al ŝi viziti ŝin la unuan nokton kaj ankaŭ tagmanĝi tie, francstile, tiel ke mi povu rakonti al ŝi ĉiujn informojn el de ŝiaj samfamilianoj en Amsterdamo. Do unue mia amiko surbicikliĝis kaj foriris al la tendejo. Post tio mi surbicikliĝis por iri al mia onklino, kiu loĝis ne malproksime. Sed mia biciklo iris al la malĝusta flanko de la strato, kontraŭ mia volo. Do mi haltis kaj ekzamenis la biciklon por iu malĝusteco ĉe la biciklo. Sed ĉio estis en ordo kaj bone funkcia. Do mi resuriĝis por plu rajdi. Sed ree la biciklo iris al la malĝusta flanko. Bonŝance la mallonga sed larĝa strato ne havis trafikon. Tiam mi subite komprenis, ke mi estis ebria. Mi ja en mia vivo neniam antaŭe ebriiĝis, kaj post tio neniam ebriiĝis ĝis nun, ĉar mi tiom hontis pri mi mem. Do mi devis promeni apud mia neebria biciklo. Sed mi unue havis bonan ideon: mi trinkis multe da akvo por dilui la vinon por malebriiĝi. Tio ne sukcesis, kaj poste oni informis min ke la miksado pliigas la forton de la alkoholo. Do mi atingis mian onklinon, sed la efekto de mia ebrio estis, ke mi ne plu kapablis paroli. Mia onklino tuj komprenis kio okazis, kaj sendis min rekte en la liton. Mi do maltrafis la belan francan manĝon de ŝi preparitan por mi, kaj ŝi maltrafis aŭdi ĉiujn novaĵojn pri siaj gepatroj kaj gefratoj en Amsterdamo. Mi tre hontis pri tio, kaj hontas ĝis mi reenkontos ŝin en la ĉielo (kien mi iros laŭ la promeso de mia Dio).

La kongreso estis tre interesa, kompreneble, sed okazis malagrabaĵo. La kreinto de S.A.T, kiu loĝis dum kelkaj jaroj en la komunisma Rusujo, estis tre aktive kontraŭrusa, aŭ kontraŭ Lenin, kaj regule polemikis pri tio en la gazetoj de S.A.T. Lenin ne ŝatis tion. Kaj strange du bulgaraj leninistoj restis membroj de S.A.T. kaj partoprenis en la kongreso. Ili proponis al la kongreso, ke S.A.T. decidu ne plu permesi publikigojn kontraŭ la Lenin'a Rusujo. La du bulgaroj pafis pistolojn en la aero por timigi nin por ke ni voĉu por ili. Sed oni ne akceptis ilian proponon. La proksiman tagon Lanti kelkminute venis al la podio por anonci ke li ne plu ĉeestos la kunvenojn nek la kongreson, ĉar estis tro danĝere por li.

La aŭstro kaj mi biciklis tra la nordorienta parto de Francujo, kie en la unua mondmilito francoj kaj germanoj longe batalis unuj kontraŭ la aliaj en minoj unu apud la alia. Li tre interesiĝis pri tio, kaj volis vidi ĉion. Mi estis nepacienca. Post tio, apud Luksemburgo, ni eniris en Germanujon. Hitler jam regis tie, kaj ĉiuj sur la vojoj devis saluti unu la alian per brakleviĝo kaj dirante "Sieg Heil!"; neobeo punatis. Sed ni kiel fremduloj ne bezonis fari tion. En malgranda vilaĝo ni demandis, kie troviĝas farmo, por

tranokti. Sed la demandata viro oferis al ni dormi en lia domo. La edzino preparis bonan tagmanĝon por ni ĉiuj. Sed je unu momento li vidis niajn verdajn stelojn, blankiĝis, prenegis unu en sia mano por pli bone rigardi, kaj diris ke tiuj steloj estas judaj. Ni klarigis ke ili ne estas, sed Esperanto-steloj, verdaj por neŭtraleco kaj kvinpintaj por la kvin kontinentoj. Li ne tute konvinkiĝis, kaj evidente timis ke li invitis malamikojn de Hitler. Li nenion sciis pri Esperanto, kaj evidente ne volis scii. Do la reston de la vespero li estis tre malvarmeta al ni. Se li estus rigardinta en mia dorsosako, li estus trovinta komunistajn gazetojn, kiujn mi portis en Germanujo por hejme montri, kiom kuraĝa mi estis (mi estis knabo). Tamen ĉe la landlimo por eliri en Nederlando la germanaj doganistoj trovis miajn komunistajn gazetojn kaj intencis puni min. Sed mi konvinkis ilin ke mi trovis ilin en germana kafeo kaj decidis ke ili devas ne troviĝi en la pura Hitler-Germanujo kaj intencis kunpreni ilin al Nederlando. Ili lasis min trairi, kun la gazetoj. Ili simila okazis dum la jaro antaŭ la milito, kiam juda samideano de nederlanda aŭtobuskaravano vojaĝis tra Germanujo por viziti la S.A.T.-kongreson en Danujo. La juda samideano havis komunistajn gazetojn en sia sako, kaj la doganistoj trovis tion kaj intencis elpreni lin el

nia karavano. Sed unu el ni, perfekte parolanta la germanan lingvon, povis konvinki la doganistojn ke la persono estas mensmalsana kaj ne scias kion li faris. Ili tralasis nin kun li, tamen tenis liajn gazetojn.

Malkuniĝante, la aŭstro daŭrigis sian bicikladon tra Eŭropo, kaj mi resenlaborulumis, sed studante por subiri la ekzamenon de Esperanto-instruisto, en kiu mi sukcesis post kelkaj monatoj. La ekzameno organizatis de la konata gramatikisto Degenkamp. Malmultaj posedas tiun diplomon. Pro mia sukceso oni permesis al mi aĉeti kopion de la "Plena Analiza Gramatiko", kiun libron la Libroservo rifuzis tiutempe vendi al nespertuloj, pro ĝia malfacila enhavo.

Post tio mi ekinteresiĝis pri la marksismaj ideoj kaj kuniĝis al tia malgranda grupo en Amsterdamo. Tre aktivaj en tiu politika teoriaro estis Profesoro (de Astronomio) Pannekoek kaj Johann Appell, sin kaŝanta en Nederlando sed origine de Hamburgo, kaj (poste Profesoro) Albada. Appell devis sin kaŝi ĉar KAJ la polico de Germanujo KAJ la polico de Rusujo ĉasadis lin por mortigi lin pro lia influo en la kontraŭ-hitlera KAJ en la kontraŭlenina movadoj. Oni neniam trovis lin.

de **Marcel Leereveld** el Aŭstralio

Fonto: **Aŭstraliaj Esperantistoj** AE 484

5>> eksplodis en 1939, li devis interrompi sian edukadon. Li laboris kiel fervojista laboristo kaj oficisto en malgranda urbeto ĝis la nazia okupado finiĝis. Li ricevis sian diplomon pri juro en 1946, sed ne praktikis sian profesion. Li laboris en diversaj laboroj ĝis la komenco de sia verkista kariero en 1962: asekuristo (1946-1947), vendisto (1947-1949), metala laboristo (1949-1952), malŝparita paperlaboristo (1954-1959), sceneja oficisto en teatro (1959-1962). Li eldonis sian unuan poezi-libron "Perdita Strato" en 1948. Kompreneble liaj unuaj laboroj respeguliĝis en liaj romanoj. En lia libro Proksime Gvatataj Trajnoj la fervojistoj estis tiuj, kiujn li observis dum li laboris ĉe la stacidomoj.

La morto de la aŭtoro estas ankaŭ tragikomedia. La 3-an de februaro 1997, li mortis falante aŭ saltante



el la fenestro de la hospitalo dum li estis nutranta la kolombojn. Kelkaj opiniis ke ĉi tiu estis sinmortigo. Sed en iu fonto, kiun mi legis, estas rokontite, ke la verkisto timis altecon kaj do ne povus fakte fari tion. Same al la morto de Milos, kiu havis neniun intencon pri heroeco en milito, li mortis falante el la stacidomo-platformo en la SS trajnon, kiu estis ŝarĝita kun municioj, ĵetante memfarintan bombon al la trajno provante helpi la ribelantojn. La tutaj municioj de germanoj eksplodas. Inter tiu fajro kaj fumo, kompreneble, troviĝas la cindrigita korpo de Milos. Morto kaj savitaj vivoj kune. Ne eblas bedaŭri, nek ni povas krei heroeco. Sed kontraŭe al tio, kiel akuzas la inspektoro Zednicek, ni vidas, ke Hubicka kaj Milos ne estas homoj, kiuj pensas nur pri sia amvivo, klopodas fari sinmortigo, kaj perdiĝi en siaj egoismaj sentoj. Ili estas inter la silentaj soldatoj, kiuj subtenas milojn da ribelantoj. Ĉu Hrabal, kiu flugis same al Ikaro al morto, parolis kun kolomboj en siaj lastaj momentoj, same al la stacidomo ĉefo? La filmo ne krias sloganojn, nek montras naziojn kiel filma kliŝo de "malbonuloj". Kvankam post la 2-a Mondmilito pasis pli ol 20 jaroj, tio estas, dum ankoraŭ la vundoj estas varmaj; malgraŭ tio. En la fina parto de la romano, estas eĉ pli firma mesaĝo ol ĝia tuta ironia stilo:

"Kun lasta peno, mi turnis min flanken, etendis mian brakon, ekkaptis la ĉenon, kiun la soldato tenis

firme, lia vizaĝo estis trankvila, nur estis truo en lia dekstra okulo, kiu ŝajnis al blua monoklo. Mi rompis la ĉenon, kiun tenis firme la mortinto kaj vidis malgrandan medalionon en la lunlumo. Sur flanko de la medaliono estis kvar-folia trifolio, kaj sur la alia la surskribo: Alportu bonan ŝancon... Sed la kvar folia trifolio ne alportis bonŝancon, nek al li nek al mi... Li estis homo kiel mi aŭ kiel la stacidomo estro s-ro Hubicka; li ankaŭ ne havis insignon aŭ rangon, ni pafis reciproke unu la alian kaj irigis nin al morto. Kiu scias, se ni renkontiĝus kiel civiluloj ie ajn, eble ni ŝatus unu la alian kaj ni amikiĝus. Ĝuste tiam aŭdiĝis eksplodo. Mi, kiu atendis tion kun ĝojo ekde kelka tempo, kuŝis dum iom da tempo apud la germana soldato, etendis mian manon kaj malfermis sian firmigantan palmon, kaj metis la verdan bonan ŝancon alportantan trifolion en sian palmon. Dume, fungo-simila fumo ĉirkaŭis nin, kaj denove leviĝis al la ĉielo. Mi aŭdis, la manieron la aerpremo vojaĝis sur la surfaco de la tero; ĝi fluis inter la arboj kaj la nudaj branĉoj per akra fajfanta sono; ĝi tremigis ĉion,

kvazaŭ la tremo de la trafiklampo signalpolusoj ĉe la vojkruciĝoj. Koncerne min, mi estis tusanta, kaj la elsangado el mia korpo komencis plifortiĝi. Ĝis la fino, ĝis kiam mi perdis miajn sencojn, mi estis manenmane kun la senviva korpo de la morta soldato, kaj mi ripetis en liajn surdajn orelojn la vortojn de la trajno kondukto, kiu venigis la malfeliĉajn germanojn el Dresdono: «Se vi restus en via domo aŭ sidiĝus sur viaj pugoj...» *

La filmo de Menzel premiigis kvinfoje, ĉefe en la Internacia Mannheim-Heidelberg film festivaloj en la jaroj 1966, 67 kaj 68. Ĝi rakontas la Duan Mondmiliton kaj la kontraŭstaradon de ĉeĥoj en la fono, kaj la ordinarajn vivojn de individuoj en la antaŭplano.

* el la germana al la turka tradukis Zeyyat Selimoğlu

verkis kaj sendis **Konuralp Sunal**
22 Julio 2020, Büyükkada, İstanbulo

ALESPERANTO

verkis kaj sendis Gafur Mirzabaev el Uzbekio

Ho, nia lingvo —
kara, favorata!
Kun Vi ni ĉiam
estas animsata!
Kaj Vin ni ĉiuj
senlime adoras
Pro la adoro
malbonceloj foras!

Sur la Ter' faru
grandan, verdan ondon,
Kaj ĉirkaŭprenu
Vi la tutan mondon!
Vi estas por ni
inspiro kaj forto,
Kun Vi beliĝas
la tutmonda korto!

Ni tutfidelas
je nia kunesto,
Nin ja atendas
evidenta Festo!
Baldaŭ la Veron
kunsentos Homaro
Kaj nepre estos
Vi la lingva Caro!



Forpelu ĉiujn
barojn kaj la timojn,
Daŭrigu ĉiam
konkeri animojn!
Kaj Vi forigu
el la koroj ĝemojn,
Plantu en korojn
verdajn espersemojn!

Nia ĉefdeviz':
estas Amikeco!
Vi estas en viv'
unu kora peco
Kun Vi ni vikle
ĉiam ontentiros,
Kaj baldaŭ gravan
Venkon ni akiros!

verkis kaj sendis
Gafur Mirzabaev el Uzbekio



Solvo de la krucvortenigma

B	E		Ŝ	P
E	S	T	A	S
S	T	U	F	I
T	O	R	O	
A	S	O	J	N

	L	A	I	K	A
T	A	Ŭ	G	A	S
I	B		I	R	I
P	O	R		E	Z
A	R	E	O	L	O
N	O	R	M	O	

Komika fabeleto - aŭdita de lernantoj

Korniko sidis sur branĉo de alta, multjara kverko. Preterkuris leporo kaj demandis la kornikon: „Kion vi faras tie?“

„Mi fieras!“

„Ĉu mi povas fieri kun vi?“

„Certe. Alvenu!“

La leporo grimpis sur la arbon kaj sidiĝis apud la korniko.

Preterkuris vulpo. Ŝi ekvidis la leporon kun la korniko kaj demandis:

„Kion vi faras tie supre?“

„Ni fieras, fanfaronas!“

„Ĉu mi rajtas fieri kaj fanfaroni kun vi?“

„Jes, certe! Venu!“

La vulpo grimpis la arbon.

Preterpaŝis urso. Kiam li vidis la kornikon, leporon kaj vulpon sur la branĉo li demandis: „Kion vi faras tie?“

„Ni fieras, fanfaronas, pavas kaj gaskonas!“

„Ĉu ankaŭ mi povas kun vi?“

„Jes! Grimpu la arbon!“

La urso grimpis kaj sidiĝis sur la branĉon. La branĉo rompiĝis kaj la korniko ekflugis. La leporo, vulpo kaj urso falis teren.

La korniko demandis: „Ĉu vi ne kapablas flugi?“

„Ne, tute ne,“ respondis la bestoj.

„Do, kial vi volis fieri?“

Korespondo de scivolemuloj - reta demando de kursanoj

Estimataj akademianoj,

permesu, ke ni petu helpon dum serĉado de la vorto por la signo „@“. En la ĉeĥa lingvo ni uzas la vorton „zavináč“ (=volvaĵo). Zavináč signifas ankaŭ sukriĉan fiŝon, farĉitan per brasiko kaj cepo en acida saŭco. Tranĉo de la fiŝo estas volvita kiel @. Certe por @ ekzistas vorto en Esperanto. Ni dankas pro respondo kaj kore salutas el Ĉeĥio.

Rondeto el gimnazio en Mladá Boleslav

respondo de akademianoj

Estimata,

la ordinara vorto estas „po-signo“ (el komerco), ĵargone „heliko“ (pro la formo de konko helika). Vidu en PIV2 sub „heliko 3“.

Sincere

Stefan Maul

direktoro de la Konsulta Komisiono de Akademio

de Esperanto

Leter-adreso: Pferseer Str. 15, DE-86150 Augsburg, Germanio

Ret-adreso: smaul86150@aol.com



Lasta urso en la subgigantmontara regiono

el publikaĵo „Legendoj de Úpice kaj ĉirkaŭaĵo“ verkis Aneta Kalužná, tradukis Lubomír Středa.

Fine de la karnavalo en la jaro 1887 el gastejo en Zálesí elŝanceliĝis kelkaj svagaj personoj. Ili estis muzikantoj, kiuj post tutnokta ludado disiris al siaj hejmoj. En angulo de la gastejo restis dormi sur benko unusola gasto, najbaro Domáň.

Matene en la vilaĝo estis kvieto. Nur preĝejservisto Vít pretigis sin, ke li sonorigu la anĝeluson, tuj kiam komencos tagiĝi.

Ankoraŭ dum la krepusko preĝejservisto Vít celis al la tombeja pordego, kiun li devis trairi, sed subite li haltis. Sur neĝo antaŭ la pordego kuŝis stranga ŝvelforma korpo. Tempeton li eĉ ne spiris kaj nur okulegis la fenomenon, kiu ne moviĝis. Al la preĝejservisto ŝajnis, ke ĝi atendas lin, por ke ĝi povu ĵeti sin al li. Tion la preĝejservisto bone konsciis kaj ne proksimiĝis al la korpo, sed buligis neĝon kaj ĵetis la bulon al la mistera estaĵo. La fenomeno moviĝis kaj laŭte ekmurmuregis. „Tio ja estas urso“, ekpensis Vít. La sango frostiĝis en liaj vazoj, lia spiro retenigis kaj kruroj ligniĝis. Sed li konsciis ankoraŭ: „Jes, ĝi estas urso, kiu post longa vintro hazarde venis el Gigantmontaro“, rekonsciiĝis el sia rigidiĝo, ekkuregis kaj galopis rekte en la gastejon, kie sidis ankoraŭ la lasta gasto Domáň, kaj prirakontis al li, kiel li trafis sovaĝan rabobeston.

Post momento elkuris preĝejservisto kune kun postdorma Domáň el la gastejo kaj ili volis pereigi la urson. Domáň kunprenis fusilon kaj kiel sperta soldato proksimiĝis al la besto sentime kaj kun kuraĝo.

Sed la rabobesto kuŝanta ĉe la tombeja pordego tute ne moviĝis. „Ĝi estas verŝajne bestaĉo langvora de malsato“, ekpensis Domáň, ŝargis la fusilon kaj pafis. „Pum“, knalis pafo kaj la besto ĉe la pordego ekmurmuregis, sed ne falis. „Unu pafo do al ĝi ne sufiĉas“, ekkriis Domáň kaj jam denove ŝargis la fusilon. Sed en tiu momento el fosaĵo sub la pordego aŭdiĝis laŭta sakrado kaj kiel aperis, tiel aperis, subite staris antaŭ la atakantoj muzikanto Ŝimek. „Ho, vi fiuloj unikaj, kial vi ĉi tie pafas?“ li insultis ilin kaj ĉiuj proksimiĝis ĝis la pordego, kie ĉiuj ekvidis la grave difektitan kontrabason. Ŝimek ĝin portis el la gastejo

>>18